

Bulgara Esperantisto

Julio 1991



ENHAVO

- 2 Decidoj de BEA-Estraro (G. Mihalkov)
3 Pri la genezo de sufikso "-on-" (C. Murgin)
6 En la Akademio de Esperanto (V. Oljanov)
9 Kian sorton por Esperanto? (N. Aleksiev)
12 Instruprogramoj de BEA: Dua grado
14 En Esperantujo ekbrilis nova talenta arta trupo (V. Mitev)
16 Originala verkaro: La forbruligo de la pontoj (J. Modest)
III En Pisanica: Someraj Internaciaj Kursoj

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA
Redakcia konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Georgi MIHALKOV,
Kiril VELKOV, Krastju KARUCIN, Nikola NIKOLOV, Venelin
MITEV

Adreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio - Bulgario,
tel. 31-87-75

Ofsetpresejo ĉe Firmao "Pres-Esperanto", str. "Angelov vrah" 23,
Sofio.

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni
akceptas unu monaton antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj
konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por
publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas
manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario "Bulgara Esperantisto" estas abonebla
per la poŝto kontraŭ 9.60 lv. Por aliaj landoj - pere de naciaj poŝtoj
kaj UEA (kodo: prsp-r) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 ned. gld. aŭ
egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando pagita ĉe
la redakcio de "BE" estas 25 lv. Prezo de unuopa ekzemplero - 1.00
lv. aŭ 3 ned. gld.

"Bulgara Esperantisto" tutjare estas abonebla ĉe Firmao
"Pres-Esperanto". Jarabono por 1991 de "BE" estas 12.00 lv.

REKLAMTARIFO

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
990 gld.	495 gld.	247 gld.	123 gld.

La Redakcio de "BE" aperigas reklamojn en diversaj lingvoj ofertitajn
de bulgaraj aŭ eksterlandaj entreprenoj, organizoj aŭ privataj
personoj. Makleraĵo por havigo de reklamoj 20%. Movada rabato 50%.
Ekstera kovrilpaĝo kosta 50% pli. Rabato por tuja ripeto 20%.

"Bulgara Esperantisto" havas abonantojn en 57 landoj.

Represo el "BE" permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de "Bulgara Esperantisto"
por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Petar Todorov enmanigas
salutleteron al s-ro Ma Sipu (p.3). Foto: K. Savova

Niaj perantoj

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000
ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 11-1105,
70084-BRAZILIA-DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield
Road, North Thoresby, Great
Grimsby, SOUTH
HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

Federation Esperantiste du
Travail, 115, Rue Beranger,
F-92320 CHATILLON

Union Francaise Pour
L'Esperanto, 4 Bis, Rue de la
Cerisaie, F-75004 PARIS

HISPANIO

Jorge Moragues Penella,
Pintor Domingo 2-2, 46001
VALENCIA

IRLANDO

Esperanto-Asocio de
Irlando, 9 Templeogue Wood,
DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono
1-2418-18, TOKORAZAWA,
359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. "Dame
Gruev" 65, YU-96000 OHRID

PORTUGALIO

Portugala
Esperanto-Asocio,
A.S.Almeida, R. Dr. Joao
Couto, 6, r/c.A, P-1500
LISBOA

SUD-AFRIKO

C.S.Beckford, P.O. Box.
1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League for
North America, Inc. P.O.Box
1129, EL CERRITO, CA,
94530

Jaro 60

N-ro 7

Bulgara Esperantisto

ORGANO DE BULGARA ESPERANTO-ASOCIO, FONDITA EN 1919

ASOCIO PRI BULGARA-ĈINA AMIKECO

La 30-an de majo 1991 en la sidejo de Bulgara Akademio pri Sciencoj en Sofio estis fondita Asocio pri Bulgara-Ĉina Amikeco. Efektive tio estas refondo de la malnova societo pri bulgara-ĉina amikeco ĉe Ministerio pri Kulturo, kies ĉefa celo estas firmigo de la amikeco inter ambaŭ popoloj prioritare en la sfero de kulturo, scienco kaj klerigo. Ĝi ankaŭ stimulos la ekonomiajn kontaktojn kaj kontribuos al realigo de pli da kontraktoj.

Al la Asocio jam aliĝis 50 individuaj membroj kaj 15 kolektivoj - asocioj, unuiĝoj, organizoj, inter kiuj ankaŭ Bulgara Esperanto-Asocio. La unua fondkunveno elektis kunprezidantoj profesoron pri ekonomio Ivan Iliev kaj profesoron pri artscienco Atanas Bojkov. La elektita asocia estraro konsistas el 15 personoj, sciencistoj pri diversaj fakoj, eminentuloj, fakuloj pri ĉina lingvo, kulturo ktp. Estrarano estis elektita ankaŭ la prezidanto de BEA inĝ. Petar Todorov. Ni kredas, ke la tradicie bonaj kontaktoj inter bulgaraj kaj ĉinaj esperantistoj plifirmiĝos.

Mi volus kredi, ke por la fondo de Asocio pri Ĉina-Bulgara Amikeco kontribuis ankaŭ BEA. Nur en la kuranta jaro estis okazigitaj serio da kontaktoj kun Ĉina Ambaskado okaze de 40-jariĝo de Ĉina Esperanto-Ligo, kiun ĉinaj esperantistoj celebris la 15-an de marto 1991. Fine de januaro pere de la ambaskado estis sendita gratulletero al la

ĉina esperantistaro en la nomo de la Bulgara Esperanto-Asocio. Kortuŝa estis la atento, kun kiu ĉinaj diplomatoj akceptis la tri reprezentantojn de nia Asocio. Agrabla estis la fakto, ke la ĉina ataŝeo pri kulturo persone konas la prezidanton de Ĉina Esperanto-Ligo, la redaktorojn de "El Popola Ĉinio" kaj de Esperanta redakcio de Radio Pekino, kaj havas kun ili amikajn kontaktojn. Tiu ĉi renkontiĝo estis bona okazo por daŭrigo de la kontaktoj inter esperantistoj de ambaŭ landoj kaj por estigo de novaj profesiaj kontaktoj pere de Ĉina Ambaskado en Bulgario.

La 28-an de februaro j.k. la fako pri kulturo ĉe BEA organizis vesperon dediĉitan al ĉina kulturo. La plenplena salono aŭskultis informojn pri historiaj Esperanto-ligoj inter Bulgario kaj Ĉinio, pri la tradukita literaturo el la bulgara en la ĉinan pere de Esperanto; spektis bonegan videofilmon pri Ĉinio disponigitan de Ĉina Ambaskadejo; ĝuis la belartan programon prezentitan en Esperanto speciale por niaj gastoj el la ambaskadejo. La organizita aranĝo donis eblecon al la ĉeestantaj reprezentantoj de kvar bulgaraj firmaoj rekte kontakti kun niaj ĉinaj gastoj kaj proponi al ili eventualajn kontraktojn kun ĉinaj entreprenoj.

En aprilo ĉinaj diplomatoj invitis nin al renkontiĝo-vespero en sian sidejon. La vesperon ĉeestis la prezidanto de BEA

ing. Petar Todorov, vicprezidanto Venelin Mitev, la direktoro de Centra Oficejo ĉe BEA Radoslav Paraŝkevov kaj la respondeculo pri kulturagado Nedka Valjaviĉarska. Al la renkontiĝo estis invititaj ankaŭ reprezentantoj el la Instituto pri Nuntempaj Socialaj Esploroj, inter kiuj ties prezidanto prof. Nansi Behar. Niaj ĉinaj amikoj montris al ni belegajn paperfigurojn de bestoj kaj plantoj, unikajn bildojn kreitajn el diversspecaj konkoj kaj perloj. Nin ĝuigis

ankaŭ la monde konata ĉina kuirarto.

La novfondita asocio estas bona starto por disvolvo de bulgaraj-ĉinaj rilatoj. Ĝi estas bona komenco ankaŭ por evoluigo de la kontaktoj inter esperantistoj el ambaŭ landoj. Ni bondeziru sukcesan, rezultan kaj fruktodonan laboron al Asocio pri Bulgara-Ĉina Amikeco.

Nedka VALJAVIĈARSKA

DECIDOJ DE BEA-ESTRARO

Dum sia kunsido la 17-an de aprilo 1991 en Sofio la Estraro de BEA decidis:

- delegi vicprezidantojn de BEA Venelin Mitev kaj d-ro sc. Kiril Velkov partopreni la 76-an Universalan Kongreson de Esperanto en Bergeno, Norvegio de la 28-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1991. Ili estu anstataŭantoj de la komitatanoj ing. P. Todorov kaj prof. K. Popov dum la komitatkunsidoj de UEA. D-ro sc. K. Velkov faru prelegon en la Internacia Kongresa Universitato. La Asocio kovros iliajn elspezojn por pasporto, vizo, vojaĝmono, tagmono kaj tranoktado. La Asocio kovros la elspezojn por kongreskotizo de Venelin Mitev kaj devigas CO de BEA klarigi ĉu la kongresaj organizantoj kovros la kongreskotizon de d-ro sc. K. Velkov kiel lektoro en la Kongresa Universitato.

- La Estraro komisiis al Ljubomir Trifonĉovski - la prezidanto de LKK de 49-a IJK en Vraca, dum sia vojaĝo al Roterdamo en junio 1991 viziti la Centran Oficejon de UEA por subskribi la kongresan kontrakton kaj

defendi la buĝeton de la 49-a IJK en 1993 en Vraca. BEA kovras la elspezon por nederlanda vizo.

- La revuo "Panorama Esperanto" estonte aperos nur foje jare kiel almanako en 2000 ekzempleroj kaj en 3 presfolioj. La revuo enhavu artikolojn el la monda Esperanta gazetaro kaj originale verkitajn kontribuojn.

- La reklamoj de firmao "Globus" estu senpage aperigataj en "Bulgara Esperantisto".

- Sv. Kokudev plenumu la oficon direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica.

- BEA invitas unu esperantiston el Albanio por partopreno en kurso de Esperanto kaj Esperanto-aranĝoj en nia lando. La elspezojn por la restado kovros BEA.

- La Estraro komisiis al Dimitar Papazov respondi pri la ofica pasportoj kaj vizoj enkadre de BEA.

Dum sia kunsido de la 8-a de majo 1991 en Sofio la

Estraro de BEA decidis:

- aprobas la informojn pri redakcia politiko kaj la problemoj de la asocia organo "Bulgara Esperantisto".

- aprobas Georgi Mihalkov kiel novan membron de la redakcia komitato de "Bulgara Esperantisto".

- ĉesigas la eldonon de "Informilo" de BEA.

- la presado de "Bulgara Esperantisto" okazu en la presejo de "Pres-Esperanto".

- disponigas al Esperanto-societo "Sukceso" en Vraca 1000 levojn por la 11-a Deklamkonkurso, dediĉita al poezio de Botev kaj al bulgara poezio en Esperanto laŭ la jarplano de BEA.

- pro financaj malfacilaĵoj ne donas subvencion al Dimitar Terziev el Sofio por partopreno en la 76-a UK en Bergeno.

- la butikoj en str. "Ĥr. Botev" 97, kiujn ĝis nun senpage uzis firmao "Pres-Esperanto", estu transformitaj en vendejojn por esperantaĵoj de CO de BEA.

Georgi MIHALKOV,
proparolanto de la Estraro de
BEA

PRI LA GENEZO DE SUFIKSO "-ON-"

La unuaj esperantistoj nemulte interesiĝis pri la deveno de Esperanto, kaj ĝenerale kaj en detaloj. Apenaŭ en 1895 Nikolao Borovko (1863-1913) starigis demandon pri genezo de Lingvo Internacia al D-ro L. L. Zamenhof (1859-1917), sed tiu rakontis nur pri siaj knabaj revoj (ekde 1869) kaj "rapidis transiri Rubikonon", sen mencii detalojn. Poste Zamenhof havis eblecon paroli pri la genezo de nur 5 morfemoj (-ar-, ĉar, edz-, kaj, vipur-).

La esperantistaro lernis diligente la artefaritan Lingvo Internacia, korespondis fervore kun siaj eksterlandaj samideanoj, klopodis fondi Rondeton (ĉu oficiale, ĉu neoficiale) por vastigi Esperanton kaj por povi parole apliki siajn novajn lingvokononj. Oni komencis traduki el la naciaj literaturoj kaj eĉ faris provojn por verki originale en "Lingvo Internacia. Tiel, unuopuloj el multaj lokoj de diversaj landoj komencis spontane konstrui la fundamenton de la internacia, de la komunehoma kulturo pere de Esperanto.

Oni povas ĝeneralligi, ke lastatempe, iom post iom, la esperantistoj - en sia granda amaso - ekinteresiĝas pri la genezo de la

Esperantaj morfemoj kaj pri la dekoj da afiksoj kaj multaj ekzotikaj radikoj kiel **ajn**, **eĉ**, **ol**, **ju...** **des**, **ĉu**, la komuna **i** en ĉiuj tabelvortoj (**io**, **ia**, **iu**, **ie**, **iel**, **iam**, **iom**, **kio** ktp.). Mi mem ankaŭ scivolemis ekde mia esperantistiĝo (1937), sed en daŭro de duonjarcento mi sukcesis nemulton klarigi al mi mem. Tamen pro la konstanta serĉado-komparado la rezultoj komencis kristaliĝi apenaŭ en la lastaj kelkaj jaroj, ekde 1987. Iom post iom, mi komencis fari "subitajn" inventojn pri genezo de "vualitaj" morfemoj, pri kiuj mi neniam pli frue esperis atingi kaj trafi kontentigan solvon.

Kaj nun konkrete pri la genezo de sufikso **-on-**. Ekzistas sufiksoj kaj aliaj morfemoj, kies genezo estas malfacile trovebla, kaprompa. Inter ili estas la nun traktata sufikso **-on-**. Mi legis neniam pri ies esploroj tiurilate. Ĉu mi trafis la ĝustan vojon al ekzakta solvo?

En dekkelkaj lingvoj mi esploris la nomon de frakciaj nombroj (duono, triono, kvarono ktp.) kun intenco trovi spuron pri la familio kaj naskiĝloko de Esperanta sufikso **-on-**. Mia espero restis vana. Por mi la rezulto estis nulo. Mi estis konfuzita...

Komence de la kuranta jaro 1991 mi devis analizi la vorton **unco**: metamorfozo kaj signifo. Mi konstatis, ke ĝi devenas el la latina vorto **uncia**, **-ae** = **unco**. Impresis min la klarigo pri la konkreta kaj esenca signifo: unu dekduono (1/12) de diversaj mezuriloj pri pezo. Temas pri mezuro de pezo (en frakcia nombro) de ege valoraj ingrediencoj (oro, arĝento, plateno, iridio) en metalaj alojoj por fabrikado de moneroj aŭ de multekostaj varoj (reĝa krono, ringo, kandelingo, sceptro, horloĝo, akraj pintoj de mezuriloj).

Jen la varioj de vorto **unco** en diversaj lingvoj:

nacia lingvo	nomo de unco
latino	uncia, -ae
rusa	unciĵa
bulgara	unciĵa
ĉeĥa	uncie
pola	uncja
serbo-kroata	unca
hispana	unza
germana	unze
malnov-franca	unce
angla	ounce
malnov-provenca	onsa
itala	oncia
franca	once
Esperanto	unco

El la analizo de jam menciitaj nacilingvaj nomoj de **unco** mi konstatas abundon de formoj. En la komenca latina radiko "unci-" malaperis la lasta vokalo "i" kaj la unua vokalo "u" transformiĝis al "o". El malnovfranc-lingva "unce" Zamenhof adoptis por Esperanto la radikon "unc-" kaj el la moderna franc-lingva "once" li konstruis la sufikson "-on-".

En kio konsistas la netrasidebla vualo, kiu kaŝis la sekreton de Zamenhof? La sekreto konsistas en tio, ke la vorto "once" (= unco) estas fremda vorto en la franca lingvo kaj estas malofte uzata, nur kiel scienca termino. Do temas pri malofte renkontebla vorto fare de franclingvaj legantoj. En multaj modernaj lingvoj la egalvalora vorto de unco perdis en konsiderinda grado sian antaŭan signifon de frakcia nombro "once" = "dekduono" = 1/12 kaj restis domini (en la vortaraj klarigoj) la signifo: mezurilo pri pezo kun egalvaloro de proksimume 30 gramoj (unco = 30 gramoj).

La ĵus rakontita nova ekzemplo indikas, ke la sufikso **-on-** ne estas arbitre elpensita. Ĝi apogas sin sur konkreta lingva materialo (once = sufikso **-on-**). Tiu morfemo de Esperanto (**-on-**) ankaŭ iom kontribuas por proksimiĝo de Lingvo Internacia al la naturaj lingvoj.

Canko MURGIN

KIEL DEĈIFRI LA ENIGMAN NOMON ANRI DJUNAN?

En n-ro 3/1987 de Internacia Ĵurnalisto aperas sur pĝ. 9-10 poemo titolita "Du noblaj ideoj realiĝas". En la unua strofo la aŭtorino Maria Angelova skribas pri
"... la koloŝ [tiele!] ideo Djunana -

se ĉie ekzistus ruĝ, [tiele!] kruĉ organizo ..."

Je la unua lego la adjektivo "Djunana", evidente formita surbaze de iu propra nomo, havas strangan aspekton pro la nekutima komenca konsonant-paro "Dj". Sub la poem-titolo estas dediĉa noto "al la kreinto de Internacia Ruĝa Kruco - la sviso Anri Djunan".

Nun ni scias, ke temas pri homo el Svislando, kiu kreis organizaĵon kun la nomo "La Ruĝa Kruco". Tamen, por akiri pli da donitaĵoj pri li, la vojo estas barita, ĉar se ni povos trovi la ŝlosilon, kiu ebligas deĉifradon de la nomo. Anri Djunan neniel aspektas kiel svislanda nomo, nek germana, nek franca, nek itala, nek romanĉa.

Vana estas provo serĉi spurojn de tiu homo en enciklopedioj aŭ libroj pri Svislando. Ekzemple, mi rigardis la paĝojn pri la Ruĝa Kruco en la verko La fenomeno Svislando de ĵurnalisto Arthur Baur, sed li informas, ke la iniciatinto de

la Ruĝa Kruco estas Henri Dunant. Kiel, do, okazis, ke tiu nomo aperas en unu Esperanta teksto kiel Henri Dunant kaj en alia kiel Anri Djunan? Jen vera mistero!

Por tiuj, kiuj scias la francan lingvon, estas evidente, ke Anri Djunan estas provo redoni la prononcon en Esperanto de la franclingva nomo Henri Dunant. Tamen, la transskribo estas nur parte sukcesa, ĉar ne eblas per la Esperanta alfabeto prezenti la francajn nazalajn vokalojn en la silaboj "en" kaj "an", nek la ĝustan sonon de la vokalo "u" en "Du". Tiu ĉi neniel similas al "Dju". Ne nur la Esperanta alfabeto estas limigita tiurilate. Mi suspektis, ke la poetino vidis la nomon de la svislandano ekskluzive en azbuke presitaj tekstoj kaj transliteris la cirilajn literojn en sia Esperanta verko.

Konfirmo venis post konsulto de ruslingva enciklopedio, en kiu troviĝas artikolo pri "Djunan (Dunant) Anri Ĵan". Rimarku, ke tuj post la familia nomo sekvas en latinaj literoj la originala formo de la nomo. Ĝuste tion estis devinta fari la aŭtorino aŭ la redaktoro de la revuo, en kiu aperis la citita poemo,

por eviti la enigmon, ĉar ne estas certe, ke ĉiu leganto havas la paciencon aŭ kapablon deĉifri tiun dufoje transliteritan nomon.

Se oni foliumas aliajn numerojn de la sama periodaĵo kaj ankaŭ publikigaĵojn eldonitajn en landoj uzantaj la azbukon, oni povas trovi plurajn nomojn el latinalfabetaj landoj, kiuj eniris la cirilalfabetan filtrilon kaj poste elvenis tute transformitaj, kelkfoje ĝis nereconebleco, en la Esperanta alfabeto. Tamen, la leganto ne ĉiam restas en la mallumo, se la originala nomformo estas aldonita interkrampe. Jen du ekzemploj de anglaj nomoj.

a. Uolt Dizni (Walt Disney)

b. Agata Kraisti (Agatha Christie)

Sed oni ne kredu, ke la problemo estas solvita tute kontentige. "Uolt Dizni" proksimume redonas la prononcon de "Walt Disney", sed ĉe "Agata Kraisti" estas grava eraro en la transskribo de la familia nomo. La ĝusta prononco estas nek "Kraisti", nek "Krajsti", sed "Kristi"!

Sekve de tio, se oni volas prezenti la prononcon de fremda nomo per la Esperanta alfabeto, oni devas unue informiĝi pri la maniero

prononci ĝin en la lando, de kie ĝi devenas. Mi skribis "lando" kaj ne "lingvo", ĉar kelkaj samformaj anglaj kaj hispanaj nomoj estas diversmaniere prononcataj en Britio kaj Usono kaj Hispanio kaj Hispanameriko respektive. Kvankam la magazino **Monato** kutime provas indiki la prononcon de etnolingvaj propraj nomoj, la diferencoj inter Eŭropo kaj Ameriko estas preteratentitaj. Tion

reliefigas letero al la redakcio (10/1987, pĝ.4).

En pluraj etnolingvoj ekzistas prononc-vortaroj de fremdaj vortoj kaj nomoj. Mi opinias, ke tia vortaro en Esperanto estus tre utila, precipe por esperantistoj, kiuj daŭre okupiĝas pri fremdaj nomoj el plej diversaj landoj kaj lingvoj. Por komenci tiun kompiladon, mi proponas, ke ĉiuj uzantoj de ankoraŭ ne asimilitaj propraj nomoj, indiku la prononcon

interkrampe. Tiel estos eble eviti la enŝteliĝon de misaj prononcoj, fuŝa transskribado kaj malpreciza transliterado. Kompreneble, estas necese scii, ne imagi, kiel la posedanto prononcas sian nomon.

Gloso

azbuko - la cirila alfabeto, uzata por skribi kelkajn slavajn lingvojn kiel la rusan, bulgaran, serban k.a.

Bernard GOLDEN

EN LA AKADEMIO DE ESPERANTO

La laboro inter la 45 membroj de la AE (aktuale ili nombras 38) estas distribuita en 5 sekcioj:

Sekcio pri Ĝenerala Vortaro

Sekcio pri Gramatiko

Sekcio pri Fakaj Vortaroj

Sekcio pri Prononcado

Sekcio pri Literaturo

Krome ekzistas kelkaj komisionoj.

La procedado de la laboroj ordinare sekvas jenan ordon: koncernaj demandoj estas detale diskutataj en la sekcio ĝis atingo de komuna starpunkto (aŭ dominanta) kaj poste la Direktoro de la sekcio proponas la demandon, eventuale kun decidoj al la Pleno de la Akademio. La prezidanto de la Akademio ĝin diskutigas dum kelkaj monatoj, kaj poste voĉdonigas decidon; la voĉdonoj okazas koresponde, kaj decidojn oni akceptas per

absoluta nombro de la voĉdonintoj.

Mi partoprenas en la sekcioj pri Ĝenerala vortaro kaj pri gramatiko. Pli grandan intereson mi havas al la lasta, pro tio mi rakontos pri ĝia laboro. Antaŭ pluraj monatoj mi proponis al la direktoro de la sekcio prof. Michel Duc Goninaz pridiskuton de la esenco de la vortoj: **po**, **anstataŭ**, **krom**. Li akceptis mian proponon aldonante ankoraŭ du kazojn: pri **da** kaj **ĉirkaŭ** kaj **ĝis** antaŭ nombroj. Tie ĉi mi rakontos pri mia starpunkto pri ĉiuj ĉi demandoj, ĉar ĝi diferencas de la instruo de PAG de Waringhien kaj Kaloĉaj kaj de iuj aliaj aŭtoroj.

I. Pri la gramatika esenco de PO

Malgraŭ la ĝenerala prezento de **po** kiel prepozicio mi jam en la **Esperanta Gramatiko** (en kunaŭtoreco de K. Vâlev) de

1966 difinis ĝin kiel adverbbon malgraŭ la malkonsento de la kunaŭtoro, kiu pedante sekvis la poziciojn de Waringhien kaj Kaloĉaj. Sed laŭ anticipa distribuo la morfologio estis konfidita al mi, kaj do en ĝi mi havis prioritaton.

En la dua (jam memstara) gramatiko, de 1978 mi jam pli kategorie klasas **po** en la grupo de la primitivaj adverboj de maniero.

La aserto, ke **po** estas prepozicio, ne havas bazon. Ĝi tute ne akordas kun la difinoj en PIV kaj PAG pri la gramatika kategorio "prepozicio": "Nevaria vortspeco, kiu servas por submeti substantivon, pronomon aŭ esceptokaze infinitivon sub alian substantivon, sub verbon, adjektivon, aŭ adverbbon."

En la propozicio **po** povas enkonduki eĉ subjekton, ekz.:

Po du glasoj staris sur ĉiu tableto.

En la subaj frazoj la vorto **po** ne submetas substantivon, pronomon aŭ infinitivon sub alian parolelementon:

1. **La patrino donis al la infanoj po du nuksojn (egalkvante).**

2. **La instruisto havas po du lecionojn semajne (egalkvante: ĉiusemajne okazis egale du lecionoj).**

3. **Po du lecionoj okazis ĉiusemajne (subjekto).**

4. **Po du esperantistoj gvidis la grupojn (distribuite egalnombro).**

5. **Po du esperantistoj gvidis po 5 eksterlandanojn.**

6. **La oratoroj disponis po 5 minutojn**

(egaltempon distribuitan inter la oratoroj).

KONKLUDO. En ĉiu el la frazoj **PO** determinas numeralon esprimante adverban rilaton (kvanton, tempon, distribuon). En la tria, kvara kaj kvina frazoj la vortoj kun **po** estas subjektoj de la koncernaj frazoj. Ni povas ŝanĝi la funkciojn de la vortoj en la kvara kaj la kvina frazoj: "**Po du esperantistojn gvidis la grupoj**"; (**la kvara frazo**). **Tre interesa estus la ŝanĝo de la funkcioj en la kvina frazo:**

"**Po du esperantistojn gvidis po 5 eksterlandanoj**". Se mankus en tiuj du variantoj akuzativo povus okazi grava miskompreno.

El tio SEKVAS:

1. **Po** ne povas esti prepozicio.
2. Laŭ sia funkcio ĝi estas tre proksima al adverbo.
3. Laŭ enhavo ĝi estas tre proksima al **OBLE**, kontraŭ kies adverba kategorio neniu protestus.
4. El ĉio ĉi sekvas, ke **po** ne estas malhelpo uzi objektan akuzativon post ĝi, se tio estas necesa.

II. Pri uzo de la vorto **DA**

La uzo de **da** kaŝas multajn maloportunaĵojn. Pluraj el ili estas montritaj de kolego Li Shijun en lia artikolo "Promenado inter la numeraloj" (en "La Letero de l' Akademio de Esperanto" n-ro 14/1991).

En iuj okazoj ne estas differenceblaj subjekto disde objekto, ekz.:

Multe da eksterlandanoj turmentis kelke da loĝantoj.

Iom da politikistoj manipulis multe da esperantistoj.

Mi estas ema akcepti la proponon de s-no Li Shijun uzi tiajn formojn, kiuj evitigus la uzon de la ĝena da kaj tiumaniere eviti malklaraĵojn kaj miskomprenojn:

Kiom homojn vi vidis?

Min mirigas tiom stultaĵoj.

Mi petas iom akvor.

Kiom manojn mi havas?

La problemo estas, ke la Akademio de Esperanto ne rajtas krei novajn formojn eksterfundamentajn. Ĝi tamen povas toleri la uzon de la montritaj formoj.

III. Pri la sintaksa funkcio de "anstataŭ" kaj "krom"

Tiuj du vortoj, laŭ mi, en la granda plimulto da okazoj rolas kiel konjunkcioj kaj ne influas al la kazo. Tiaj mi klasas ilin en miaj gramatikoj malgraŭ la opinio de Waringhien kaj Kaloĉaj.

EKZEMPLOJ:

1. La patro anstataŭ la studentino akceptos la profesorinon. (La studentino devis akcepti la profesorinon, sed pro iuj kaŭzoj akceptos ŝin la patro).

2. La patro anstataŭ la studentinon akceptos la profesorinon. (La patro devis akcepti la studentinon, sed la programo estis ŝanĝita kaj li akceptos la profesorinon).

Se mankus en tiuj ĉi okazoj la akuzativo, ne estus klare kio estas subjekto kaj kio - objekto de la ago. La vorto **anstataŭ** ludas rolon sendube de konjunkcio liganta du propoziciojn. La kompleta formo de la frazoj devus esti:


1. Anstataŭ ke la studentino akceptus la profesorinon, akceptos ŝin la patro.

2. Anstataŭ akcepti la studentinon, la

patro akceptos la profesorinon.

En tiuj frazoj estas sendisputa la konjunkcia funkcio de la vorto **anstataŭ**, sekve - la funkcio de rekta komplemento de la vortoj: **studentinon** kaj **profesorinon**.

Tio estiĝas absolute klara en la suba grafikaĵo de du preskaŭ samsencaj frazoj:



La rezonojn pri la funkcioj de **anstataŭ** oni povas apliki ankaŭ rilate al la funkcioj de **krom**.

Ĉiu el ni invitos ilin, krom (sed ne) la virinoj (la virinoj ne invitos ilin).

Ĉiu el ni invitos ilin, krom la virinojn (ĉiu el ni invitos ilin, sed ne la virinojn).

KONKLUDE:

Anstataŭ kaj **krom** en la granda plimulto da okazoj ludas rolon de konjunkcioj kaj ili ne povas esti kaŭzo eviti uzon de objekta akuzativo. Tamen pro la ĝisnuna tradicio en tiuj ĉi okazoj la uzo de akuzativo povus esti nedeviga, se la aŭtoro opinias, ke ne povas estiĝi miskompreno.

IV. Speciala kazo de uzo de "ĉirkaŭ" kaj "ĝis"

Tiuj du vortoj uzitaj antaŭ numeralo laŭ sia semantika enhavo evidente funkcias kiel adverboj kaj ne prezentas baron por uzo de akuzativo. (Ili ja estas uzataj en senco de **proksimume** kaj **maksimume**).

Violin OLJANOV,
vicprezidanto de AE

Kian sorton por Esperanto?

Estimata samideano,

Kia estos E-movado en pasintaj ŝtatoj de socialismo, nome en Bulgario? Multaj homoj interesiĝas nur pri "vivaj lingvoj", precipe pri angla lingvo. Oni ne vidas la utilon lerni Esperanton. La E-eldonaĵoj ne estas profitodonaj, estas tre multekostaj, malinteresaj ktp. Nia movado multloke aspektas kiel dubindaĵo aŭ eĉ kiel suspektindaĵo.

Kiaj estas niaj geesperantistoj? Preskaŭ ĉiam: geknaboj kaj gemaljunuloj. Maturiĝante la geknaboj forgesadas la lingvon. Ofte ili opinias: "Ni ludis iam, sed nun ni devas labori, lerni "normalajn" lingvojn ktp.

Kiel vi pritaksas la situacion? Kion vi opinias?

Esperantistino el Odeso, USSR

Bonan tagon, estimata samideanino,

Mi promesis en mia letero al vi de la 2.11.90, ke post resaniĝo mi denove skribos al vi. Bedaŭrinde, mia resaniĝo daŭris kelkajn monatojn. Post mia reveno el kuracado en sanatorio mi relegis vian leteron.

Jes, vi skribas pri fenomeno, kiu estas bone konata ankaŭ en Bulgario - forta interesiĝo al la t.n. "negocaj" (bussines) lingvoj, precipe al la angla. Oni ekspluatas senhonte tiun interesiĝon, instruas primitive la anglan, postulas grandegajn honorariojn ktp. Tia estas la situacio en niaj landoj - oni deziras krei "merkatan ekonomion", kiu estas ebla ĉefe per mono kaj... la angla lingvo.

Kompreneble, nun Esperanto ne estas laŭmoda, ĉar per ĝi oni ne povas gajni monon.

Kompreneble, ne ĉiuj homoj estas negocemaj kaj iuj el ili daŭre interesiĝas pri la Internacia Lingvo. Sed ĝenerale la moderna tempo ne favoras ĝin.

Vere, iuj lernas Esperanton pro hobia, aliaj - pro ekskursemo en fremdajn landojn, triaj - pro iuj idealaj celoj. Homoj diversaj - motivoj

diversaj.

Mi persone lernis la Internacian Lingvon kaj utiligas ĝin precipe pro ideaj kaŭzoj. Sed oni ne devas subtaksi ankaŭ tiujn personojn, kiuj lernas ĝin pro aliaj celoj, ĉar ĉiuj ili objektivite helpas al la evoluo de la E-movado.

Vere, en la eksaj socialismaj landoj pri Esperanto nun interesiĝas precipe lernantoj kaj maljunuloj. Laŭ si mem tio ne estas malbona. La mezaĝa generacio dum sia juneco ne estis interesata pri tiu lingvo, eĉ rilatis al ĝi kiel al io dubinda aŭ eĉ suspektinda, ĉar la reĝimo de personeckulto edukis ĉe ili (la tiamaj junaj kaj ne nur junaj homoj) negativan rilaton al Esperanto. Tio okazis ankaŭ dum la periodo de faŝismo. La postsekvoj de simila rilato sentiĝas nun ĉe multaj personoj, efikantaj la ĝeneralan atmosferon pri lernado de la Internacia Lingvo, precipe se similaj personoj estas influhavaj laŭ sia sociala stato aŭ posteno.

Sed ĉio nova kaj progresema ĉiam havis malfacilan evoluadon pro superstiĉoj kaj persekutado. Kion fari? La historio de homara progreso atestas pri tio. Tial nur eta parto subtenas Esperanton kaj aktivas en la

E-movado. Tiuj homoj estas precipe idealistoj. Mi apartenas al similaj personoj kaj de 1924 jaro estas esperantisto, suferis multe pro tio, sed restis fidela al la lingvo kaj al ties movado, partoprenante antaŭ ĉio ĝian progreseman alon.

Vi pravas: ne ĉiuj E-eldonaĵoj estas interesaj, sed estas ankaŭ seriozaj. Bedaŭrinde la merkatisma rilato al la kulturaj aferoj kreis malbonegan situacion por la kulturaj movadoj kaj ties eldonaĵoj. Tial unu post la alia ĉesas aperadi multaj seriozaj E-gazetoj kaj libroj. La E-movadoj en ĉiuj landoj estas malriĉaj, la ŝtataj instancoj ne plu subtenas kaj subvencias ilin. La altiĝo de la produktadkostoj malebligas al la esperantistaro serioze monhelpi la eldonadon.

Sed similaj krizaj momentoj ekzistis ankaŭ en la pasinteco, tamen post ili Esperanto reviviĝis. Mi sendas al vi mian raporton pri la centjariĝo de Bulgara E-movado, kie mi traktas ankaŭ tiujn momentojn. Krome mi sendas al vi ankaŭ mian verkon "Esperanto centjara" (ĝi estas en la bulgara, sed mi esperas, ke vi tamen orientiĝos en ĝia enhavo pro la simileco de la bulgara al la rusa kaj

ukraina lingvoj). Se post ilia tralego vi restos pesimistema rilate Internacian Lingvon, mi ne povas helpi al vi resti fidela al Esperanto. Dum mia longa esperantista vivo (1924-1991) mi labioris kiel esperantisto sub ege malfacilaj cirkonstancoj, same kiel sub tre favoraj. La favorajn bedaŭrinde ni perdis, la malfavoraj nun abundas, sed mia kredo kaj espero pri pli bonaj tempoj ne estingiĝas. Taksu tion kiel nerealisman aŭ kiel nekorekteblan idealismon - mi ne ofendiĝos, mi daŭre sekvos mian vojon de E-adepto laŭ la malnova slogano "Ni fosu nian sulkon!".

Rilate la forgesadon de Esperanto ĉe iuj lernantoj kiam ili maturiĝas: tio validas pri ĉiuj lingvoj. Mi studis kelkajn lingvojn: la francan, la rusan, la germanan, la latinan. Kiam mi praktikadis ilin (temas precipe pri la modernaj) mi parolis kaj legis ilin flue kaj bone, sed kiam dum longa tempo mi ne plu praktikis ilin, mi multon forgesis. Nun mi aktive utiligas nur la rusan kaj Esperanton.

Do, fartu bone!

Via bulgara samideano:

Nikola ALEKSIEV,
esperantista veterano

TEATRA VESPERO

La 27-an de majo k.j. en kulturdomo "Slavjanska beseda" en Sofio okazis teatra spektaklo. La prezentaĵo estis organizita laŭ iniciato de la Estraro de BEA pri okazigo de ĉiumonataj kulturaranĝoj.

Impresis la formo de teatra prezentado: ĉetabla teatro. La geaktoroj de BET plenumis du komedietojn. En la unua "La kobajo", originale verkita en Esperanto de Raymond Schwartz, ludis la geaktoroj Angelina Sotirova, Darinka Goranova kaj Teo Jurukov. La intrigo estas amĵaluzo kaj la eksperimento: ĉu se iu hazarde alparolus iun el la rolantinoj, ties amanto mortpafos la arogantulon.

La duan komedieton "Eŭropa firmao" de Georgi Mihalkov prezentis aktorinoj Luna

Davidova kaj Ginka Toteva. Du boparencinoj planas fondi firmaon kaj evidentiĝas, ke la Lingvo Internacia pli taŭgas por internaciaj kontaktoj ol la angla.

Inter la du teatraĵetoj la konataj aktoroj Nikolaj Uzunov kaj Nikolaj Ivanov ĝojigis la publikon per humuraĵoj.

Per tiu teatra vespero finiĝis la sezono de sofiaj kulturaj aranĝoj, organizitaj de BEA, sed la E-publiko atendas novajn interesajn renkontiĝojn kun la majstra teatra prezento de BET.

Rumjana GEORGIEVA

BOTEV-RECITALO EN VRACA

Premioj

Dum la oficiala malfermo de la 11-a konkurso-recitalo pri Botev-poezio en Esperanto la 25-an de majo en Vraca, la vicprezidanto de BEA d-ro sc. Kiril Velkov i.a. rimarkis, ke ĉi-jare ĝi estas influita de la socia kaj ekonomia stato de la lando: la partopreno estas pli modesta, mankas eksterlandaj gastoj. Sed gravas, ke la tradicio daŭras kaj tiu esperantista kultura evento denove trovis sian lokon en la ĉi-jaraj festoj "Botev-tagoj", dediĉitaj al la 115-jariĝo de la heroeca morto de la bulgara geniulo, kies vivo kaj talento lasis spuron en la nacia historio kaj fariĝis simbolo de la bulgara poezio, libereco kaj popola spirito.

Unu post alia prezentis sin per la eternaj versoj de Botev deklamantoj el Vraca, Razgrad, Orjaĥovo. Aparte kelkaj junuloj plenumis siajn eseojn pri Botev, diligente preparitajn en la kursoj de Esperanto en Vraca. Eksonis kantoj, kies tekstojn la popolo ĉerpis el la verkaro de Botev.

Fine de la konkurso-recitalo la prezidanto de la ĵurio d-ro sc. Aleksandar Dunĉev analizis la prezentojn kaj donis praktikajn konsilojn al la deklamantoj, por ke ili estonte altigu sian artnivelon.

La 29-an de majo k.j. enkadre de la Semajno de Infano, en Vraca denove sonis verkoj de Botev en Esperanto.

L. ALEKSANDROV

I. Premioj de Bulgara Esperanto-Asocio:

1. Infangrupo de E-societo "Georgi Stanev" - Orjaĥovo, kun gvidantino Nadeĵda Bosaŝka.
2. Desislava Plamenova Dimitrova - Razgrad.
3. Petja Emilova Kovaĉeva - Vraca.

II. Premioj de Boteva organiza komitato:

1. Infangrupo el lernejo "Ivan Nivjanin" - Vraca, kun gridantino Sonja Predoeva.
2. Daniela Nikolaeva Georgieva - Razgrad.
3. Erma Atanasova Georgieva - Vraca.

III. Premioj de E-societo "Sukceso" - Vraca:

1. Eli Petrova Aksentieva - Vraca.
2. Silvija Jordanova Georgieva - Vraca.
3. Desislava Volodieva Predoeva - Vraca.

ĴURIO:

Prezidanto: d-ro sc. Al. Dunĉev

Membroj: L. Trifonĉovski, d-ro sc.
K. Velkov

PLOVDIVA AKTIVADO

• En la Esperanta Kulturdomo en Plovdiv estis organizita libroservo. Ĉiuj esperantistoj, vizitantoj de Plovdiv, povas aĉeti interesajn librojn kaj esperantajĵojn en la nova Esperanta libroservo, kiu troviĝas en strato "Maksim Gorkij" 15.

• La 8-an de majo 1991 la plovdivaj esperantistoj havis eblecon aŭskulti la novan

songazeton, prezentitan de la plej nova Esperanto-societo ARE - Amika Rondo Esperantista. La songazeton prezentis Zdravka Bogdanova. Ĝi enhavas interesajn eseojn, artikolojn, beletrajn verkojn en Esperanto.

• La 3-an de majo 1991 en la Esperanta Kulturdomo en Plovdiv kolektiĝis junaj geesperantistoj el Plovdiv por

renovigi la junularan Esperantan grupon. Ili elektis novan estraron de la grupo kaj delegitojn, kiuj partoprenis en la Nacia Konferenco de BEJ, kiu okazis la 11-an de majo 1991 en Kazanlâk. La grupo planas aktivigi sian partoprenon en la E-aranĝoj en nia lando kaj en la internacia Esperanta movado.

Instruprogramoj de BEA

DUA GRADO

I. CELOJ

La daŭriga kurso sekvas la elementan kaj celas firmigi la konojn, ricevitajn en la unua grado, profundigi kaj vastigi ilin, pliriĉigi la vortaron, kutimigi al senripoĉa parolo, al konstanta praktikado.

La lernantoj devas kompreni ne tre malfacilan tekston el la Esperanto-gazetaro kaj literaturo. La tekstoj povas esti ĉu adaptitaj, ĉu neadaptitaj, tamen bazitaj sur la konata leksiko. La lernantoj kapablu korespondi pri ĉiutagaj, sociaj kaj profesiaj problemoj.

Por atingi tiujn celojn, la lernantoj devas povi: kompreni, aŭskultante, la parolon de sia instruisto kaj de aliaj personoj; legi gazetaron kaj literaturajn verkojn, koncizajn popularsciencajn rakontojn, uzante vortaron; paroli - fari ne tre longajn dialogojn pri konataj temoj, prezenti legitan aŭ aŭskultitan tekston laŭsence.

La histori-literatura materialo konatigu la lernantojn kun la Esperanto-movado de la Unua periodo, kun la vivo de la esperantistoj en diversaj landoj, kun la eblecoj veturi tra la mondo kaj partopreni diversajn Esperanto-aranĝojn.

Ce la fino de la kurso la lernantoj devas povi senĝene legi kaj kompreni tekstojn, laŭ nivelo du de *Kontakto* (aŭ eĉ tri, kun vortaro) kaj sufiĉe flue konversacii. Ideale li/ŝi povu fari ekzamenon laŭ la normo de UEA/ILEI.

II. ENHAVO

A. Leksiko / Temaro

1. Hejmo - konstruo, luado, aranĝo de la pagoj, mebloj kaj ties mendo.
2. Familio - problemoj, interrilatoj.
3. Vojaĝoj kaj aĉetoj en diversaj sezonoj.
4. Kuirado, manĝado, restoracioj.
5. Kultura vivo - teatro, kino, koncertoj, opero.
6. Eksterlanda vojaĝo. Feriado. Kongresoj.
7. Poŝto, leteroj, telefono, moderna komunikado.

B. Gramatiko.

1. Transitivigo kaj netransitivigo de la verboj.
2. Reciprokeco.
3. Participoj - aktivaj kaj pasivaj. Uzo kaj anstataŭigo.
4. *Iĝ*, pasivaj participoj, *oni* - komparo ĉe la uzado.
5. Rekta anstataŭ nerekta objekto. Akuzativo anstataŭ prepozicio.
6. Akuzativo ĉe transiro al nova stato, formo, situacio.

7. Akuzativo post *anstataŭ*, *kiel*, *krom*, *ĉirkaŭ*, *ol*, *po*.

8. Simpla frazo kaj ĝiaj elementoj.

9. Kompleksa predikato. Predikativo.

10. Uzado de prepoziciaj kaj konjunkciaj paroj (*el sub*, *de antaŭ*; *nek... nek*, *jen... jen* ktp).

La gramatikon necesas instrui praktike, eviti sencelajn klasifikadojn, ŝpari klarigojn, se io estas memkomprenebla kaj montri ĉefe la diferencojn kun la nacia lingvo.

C. Historio, movado. Literaturo.

1. Planlingvistiko.
2. La movado kaj la literaturo dum la Unua periodo (antaŭ la Unua Mondmilito).
 - a. Zamenhof.
 - b. Batalo por lingvo-unueco; voĉdonado en 1894; Ido-skismo.
 - c. La Unua Universala Kongreso. La Bulonja deklaro.
 - d. La Bulgara Esperanto-movado.
 - e. Literaturo - frua ruslanda skolo (*Zamenhof*, *Grabovski*, *Kabe*); *E. Privat*. La unuaj bulgaraj aŭtoroj.
3. La internacia Esperanto-movado - *UEA*, *TEJO*, landaj kaj fakaj asocioj. *Delegita Reto*, *Pasporta Servo*, *Akademio de Esperanto*.
4. La Esperanto-gazetaro. Radioelsendoj en Esperanto.
5. Esperanto-kulturejoj: *Gresillon*, *Kulrura Centro Esperantista en La Cheau de Font*, *Kvinpetalo* ktp.

III. EKZAMENO

Antaŭekzamena testo

Anticipe necesas trapasi teston (45 min.), kiu pruvas la praktikan konon de la gramatiko. Nur la sukcesintoj rajtas sin prezenti al la ekzameno. Oni ne toleros pli ol 20% de eraroj.

La instruanto mem preparu la teston por ĉiu aparta ekzameno (vidu la specimenon).

Ekzameno. Skriba parto.

La skriba ekzameno daŭras 150 min kaj konsistas el verko (ĉirkaŭ 60 mane skribitaj linioj) je temo, elektita el inter tri proponitaj. Uzo de vortaroj permesita.

Ekzameno. Parola parto.

Ĝi konsistas el:

- iomete lego kaj rerakonto de 20-30 presitaj linioj de konata teksto el inter 25-30 anticipe difinitaj legaĵoj. Dum la preparo (ĉirkaŭ 30 min) eblas fari nur minimumajn notojn;
- respondoj al demandoj pri la instruita literatura kaj historia materialo;

- libera konversacio.

Specimena antaŭekzamena testo:

Forstreku la superfluan.

Si transformiĝis en (belan junulinon; belulino; etan azeno).

La gepatroj translokiĝis apud la (fenestro; Varsovion; kamenon).

Francisko kolere transiris en (najbara magazeno; nova ĉemizo; apudan ĉambron).

Mia amiko translokiĝis kun sia amikino en (maron; vilaĝo; novan loĝejon).

Johano plezure tradukas en (france; orientajn lingvojn; Esperanto).

Uzu korekte adverbigitajn prepoziciojn.

La aviadilo malaperis _____.

La submarino direktiĝis _____.

La rivero estis longa; ili jam kvaran tagon iris _____.

La turistoj marŝas _____.

Klara volas aboni gazeton _____ de vi.

Aldonu la ĝustajn finaĵojn. Elektu el -o, -a, -on, -an, -oj, -aj, -ojn, -ajn, -n, aŭ -aldonu nenion.

Tramo atingis la nov _____ pont _____ meze de la urbo. Sargaŭto turniĝis subite dekstre _____ kaj trafis ĝi _____. Okazis akcident _____ kaj tio _____ vidis du junul _____, kiu _____ estis preterpasant _____. Ili rigardis si _____ kvazaŭ dubant _____.

"Kie vi iras?"

"Al tiu telefonbud _____, de kie mi povos voki la polic _____."

Post kelk _____ minut _____ alvenis kvar policist _____, kiu _____ trankviligis la timigit _____ pasager _____.

(laŭ Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Rotterdamo/Antverpeno, 1989)

Metu taŭgan prepozicion.

Hieraŭ matene nia grupo ekveturis _____ buso _____ la monto. Ni atingis la supron _____ la 9a horo. Ekskursis ĉiuj, _____ unu, kiu _____ la sama tago gastis _____ siaj parencoj _____ vilaĝo. _____ nelonga irado ni atingis la montodomon. Multaj kunportis _____ unu aŭ du sandviĉoj. _____ la aliaj estis kukoj kaj kafo _____ la bufedo. _____ la lunĉo ni iris _____ la herbejo kaj ludis _____ pilko. Reen la buso denove veturis _____ bela arbaro _____ longa pitoreska vojo.

(laŭ Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Rotterdamo/Antverpeno, 1989)

Aldonu la ĝustan finaĵon: ĉu -is, -iĝis aŭ -igis.

Ni komenc _____ promeni frumatene, sed post horo la vetero subite malbon _____. Ekpluvis, do ni decidis halti. Ni atendis, ĝis la pluvo ĉes _____. Ni ar _____ branĉojn kaj prepar fajron, per kiu varm _____ akvon. Post kelkaj malfacilaĵoj la akvo bol _____. Ni trink _____ la hundon per freŝa akvo, kaj ni mem kontentis trink _____ teon. Post kelkaj minutoj ni ĉiuj resek _____.

(Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Rotterdamo/Antverpeno, 1989)

En la spacojn aldonu taŭgajn vortojn, kiujn vi formu el la donita radiko per aldono de afikso(j) aŭ kvazaŭ-afikso(j) kaj finaĵo.

BEL

estas tre subjektiva koncepto.

La vetero _____.

Tiu akvofalo estas nacia _____.

Sminko kaj ungofarbo estas virinaj _____.

IR

Tie okazis akcidento. Vi nepre devas veturi en tiun alian direkton. Tio estas la vojo _____.

Valoras la penon traveturi tiun regionon. Kredu min, tiu vojo estas _____.

Tiuj eksterlandanoj erare legis la afiŝon kaj turnis dekstren anstataŭ maldekstren.; ili komplete _____.

MON

"Mi volas telefoni. Ĉu vi havas kelkajn _____?"

"Eĉ ne _____ unu. Mi estas komplete _____."

"Vidu, mia _____ estas tute malplena."

(Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Rotterdamo/Antverpeno, 1989)

Enmetu por aŭ por ke kaj verban finaĵon.

Ili diskutas, _____ rest _____ klara ilia pozicio.

Infano manĝas, _____ kresk _____.

_____ kredig _____ min, ili terure detaligas. Ĉu mi pli laŭte parolu, _____ ĉiuj pov _____ aŭskult _____.

(Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Rotterdamo/Antverpeno, 1989)

Specimenaj temoj por la skriba ekzameno.

1. Organizado de la internacia Esperanto-movado.

2. Bonajtoj de internacia lingvo, kia Esperanto.

3. Mia laboro.

Specimenaj demandoj pri la Esperanta kulturo por la parola ekzameno:

1. Nomu du internaciajn revuojn en Esperanto kaj preparolu iliajn enhavojn kaj celojn.

2. Nomu du servojn de UEA kaj klarigu ilian utilecon.

3. Donu informojn pri la Universalaj kongresoj.

4. Rakontu, kion vi scias pri la vivo de la kreinto de Esperanto; nomu liajn verkojn aŭ skizojn lian rolon en la disvastigo de la lingvo.

5. Nomu radio-stacion, kiu elsendas ĉiutage en Esperanto kaj klarigu la gravecon de radio-elsendoj por la Internacia Lingvo.

6. Nomu du Esperantajn verkistojn. Donu kelkajn informojn pri ili kaj pri iliaj verkoj konataj de vi.

7. Klarigu la sekvajn mallongigojn kaj donu informojn pri unu el ili: TEJO; FD; KCE; UK.

8. Diru, kion vi scias pri la bulgara Esperanto-movado.

(laŭ Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Rotterdamo/Antverpeno, 1989)

EN ESPERANTUJO EKBRILIS NOVA TALENTA ARTA TRUPO

Jen la spektaklo, pri kiu mi delonge revis! Ĉar dum la tridek jaroj, dum kiuj mi estas en la Esperanto-movado, mi multfoje estis devigita disputi kun neesperantistoj citantaj kiel plej forta argumento kontraŭ ni la fakton, ke neniam ili legis E-literaturaĵon tradukitan en bulgaran lingvon aŭ ne spektis veran teatraĵon kreitan de E-verkisto. Ve, ni tre ofte ignoras tiun ĉi fakton kaj faras preskaŭ nenion por allogi senpere kaj delikate novajn simpatiantojn.

Julian Modest, kiun la esperantistaro jam bone konas kiel originala prozisto kaj dramverkisto, verkis en bulgara lingvo novan teatraĵon - "Enŝteliĝi en la koron", kiu nun estas prezentata ne nur antaŭ esperantista publiko kaj tial ĝi certe varbos novajn adeptojn al nia ideo.


Fakte pri Esperanto ne temas en tiu ĉi teatraĵo. Nur iufoje dum la tuta spektaklo oni ekparolas pri tio, ke la ĉefa persono, tre fama aktorino, ludas ankaŭ en E-teatro. Kaj tio ĉi do sufiĉas, ĉar ĉiuj aldonaj eksplikoj kaj detalaĵoj eksonus kiel enuiga propagando. Julian Modest trovis la plej rektan vojon al la koro

de la spektanto - li kreis tre interesan, multflankan kaj kompleksan individuon, kiu sendube akiros liajn simpatiojn.

Unuavide, la intrigo estas simpla: reveninte post la noktomezo, aktorino trovas en sia

loĝejo junulinon, kiu ŝtelas. La neatendita renkontiĝo de du tute malsimilaj virinoj estas serioza kialo por ŝanĝo de iliaj principoj kaj mondperceptoj.

Atente kaj singarde ili serĉas vojon unu al alia. Ĉu tutan vivon ni ĉiuj ne serĉas vojon al alies koro kaj ĉu ni ne



strebas enŝteliĝi en ies koron por trovi tie iom da varmo kaj amo? Dank' al la meznoktaj konfeso de la ambaŭ virinoj - tute sinceraj, korŝirantaj - ni komprenas, ke ili ambaŭ estas solaj kaj senesperigintaj kaj ke inter ili iom post iom etendiĝas nevideblaj, misteraj spiritaj fadenoj. Finfine la spektanto komencas sin demandi ĉu la juna senhontulino efektive enkuris la domon de la aktorino por ion ŝteli aŭ ŝi simple eniris tien por konatiĝi kaj paroli kun ŝi, kaj ĉu la aktorino ne estas jam senfine dankema al la sorto, ke en ĉi malfrua horo la sorto sendis al ŝi tiun ĉi ĉarman etulinon por savi ŝin almenaŭ por momento el la deprimeco

kaj soleco?

Tiel malantaŭ la simpla intrigo reliefigas la figuroj de du interesaj estaĵoj, kiuj vivas en sia propra, riĉa kaj neordinare komplika mondo kaj kiuj strebas fortege al ia revita feliĉo, kiu eble neniam ekridetos al ili.

Julian Modest denove pruvas, ke li estas majstro de la dialogo havanta, kiel sciante, unuagradan signifon en la dramverkoj. La atmosfero senĉese streĉiĝas kaj dum la tuta tempo la spektanto kunsentas la sortojn de la ambaŭ ĉefrolulinoj por ekami ilin en la fino de la spektaklo.

Mi antaŭe legis la teatraĵon, ĝi jam ege plaĉis al mi kaj tiel mi estis tre maltrankvila, kiam veturis al urbo Jambol por spekti ĝian unuan prezenton.

Feliĉe, miaj timoj ne efektiviĝis. La ambaŭ ĉefrolulinoj, Angelina Sotirova kaj Nevjana Krasteva, ludis tiel inspire, tiel inteligente kaj profesie, ke ili juste ricevis la entuziasmajn aplaŭdojn de la publiko. Ili sukcesis eltiri el la teksto novajn, nesupozitajn de mi motivojn kaj sonorojn, kiuj igas la heroinojn pli sangoriĉaj kaj dramecaj.

Angelina Sotirova estas ne nur aktorino, kiu rolas en bulgaraj kaj Esperantaj teatraĵoj kaj gastrolis en Germanio, Hungario, Sovetio, Kubo kaj en aliaj landoj. Ŝi estas instruanto en la Nacia Akademio pri Teatro kaj Filmarto en Sofio.

Nevjana Krasteva ne estas profesia dramaktorino; ŝi estas kantistino, muzikpedagogo, estrino de muzikgrupoj kaj aŭtorino de infanaj kantoj kaj kanzonoj. Sed ŝia talento evidente estas tre multflanka, ĉar ankaŭ sur la teatra scenejo ŝi prezentis sin kiel altkvalita aktorino.

Antaŭ kelkaj monatoj Julian Modest, Angelina Sotirova, Nevjana Krasteva kaj nia nova samideano Miĥail Ferdotov, aktoro en la Muzika Teatro en Sofio, fondis Artan Esperantan Trupon "Fokuso", kiu havas la noblan ambicion surscenigi teatrajn verkojn de nuntempaj Esperantaj aŭtoroj kaj tiel flegi la modernan Esperantan teatron.

"Fokuso" en sia repertuaro havas tri unuaktajn dramojn, ĉiuj el ili daŭras unu horon.

Do, la trupo estas eta teatro, eĉ oni povas nomi ĝin teatro en valizo, ĉar la tri geaktoroj mem prizorgas la reĝisoradon, la dekoraciojn, la muzikon. Ĝi povas facile veturi, ĉar ĝiaj spektakloj ne bezonas grandan scenejon kaj estas prezentitaj en kafejoj, klubejoj, sur etaj scenejoj.

La unua spektaklo de la trupo estis "Venontjare denove kune" de Angelina Sotirova, laŭ motivoj de la teatraĵo "Venontjare la saman tempon" de l' usona dramverkisto Bernard Slade. Ĉiujare dum unu sama tempo du homoj - virino kaj viro - traveturas kontinentojn kaj marojn por renkontiĝi dum la Universalaj Esperanto-kongresoj, por kune eniri la altaron de la amo, ĉar la amo estas la plej belega travivaĵo en la homa vivo.

Post la unua prezento de "Enŝteliĝi en la koron" sekvos spektakloj de la nova dramverko de Julian Modest "Pluvvespero", en kiuj rolos Angelina Sotirova kaj Miĥail Ferdotov. La unuaj prezentoj de "Fokuso" jam montris, ke en Esperantujo ekbrilis nova talenta arta trupo, kiu sendube daŭrigos sukcese la multjarajn kulturajn tradiciojn de nia kara Lingvo Internacia.

Venelin MITEV

Julian MODEST

LA FORBRULIGO DE LA PONTOJ

Ĉi-vespere onklino Maria estis ĝoja kaj feliĉa. En ŝia eta domo, ĉe la granda tablo, sidis ŝia tuta familio, la filo Petro, la bofilino Irina, la genepoj Anton kaj Maria. Speciale por tiu ĉi vespermanĝo onklino Maria bakis grandan panon, faris kotletojn, fritis terpomojn, preparis freŝan salaton. Delonge en ŝia domo ne estis tia granda ĝojo kaj ŝia koro vere plenis pro feliĉo, simile al la tablo, kiu plenis pro manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Finfine unu granda revo de onklino Maria povis realiĝi. Morgaŭ frumatene ŝia filo kun bofilino kaj du infanoj Anton kaj Maria ekveturos ekskurse al Kubo.

Delonge onklino Maria revis pri tiu ĉi momento. Ŝi, gimnazia instruistino pri franca lingvo, neniam havis eblecon veturi eksterlanden, viziti forajn nekonatajn landojn, eĉ en Francio ŝi ne estis, malgraŭ ke dudek jarojn ŝi instruis francan lingvon kaj plurfoje devis rakonti al la lernantoj pri Francio kaj Parizo. Tamen ŝi ege deziris, ke ŝia filo Petro veturu, ke li vizitu malproksimajn landojn, anstataŭ ŝi, li vidu ilin kaj tiel li realigu ŝian plej karan junulinan revon. Ne hazarde onklino Maria instigis Petron jam de infaneco lerni lingvojn, studi kaj tiamaniere ŝi sukcesis veki en li la deziron vojaĝi kaj ekkoni la vastegan mondon.

Finfine la momento, kiun onklino Maria longe atendis, alvenis. Petro kaj Irina havis iom da mono, onklino Maria same iom helpis ilin per sia modesta pensio, kaj morgaŭ frumatene ili ekflugos por dektaga ekskurso al Kubo. Neniu atendis, ke ili, tiel junaj, havus tian ŝancon. Ja, la homoj tutan vivon vivas kaj eĉ Parizon neniam ili vidis.

- Je via sano, karaj miaj, kaj agrablan vojaĝon - diris onklino Maria kaj levis sian glason, plenan je aroma ruĝa vino.

- Je via sano, panjo, kaj koran dankon pro la helpo, ĉar sen vi, neniam ni ekskursus al Kubo - diris ĝoje Petro kaj liaj okuloj, similaj al du brilaj olivoj, eklumis feliĉe.

- Je via sano, panjo, kaj koran, koran dankon - aldonis karridete Irina kaj tiu ĉi ŝia rideto, el kiu ĉiam radiis tiom da varmo kaj kareco, denove profunde kortuŝis onklinon Maria.

Irina, kun siaj molaj blondaj haroj, bluaj okuloj, similaj al du etaj montaj lagoj, estis malalta, tenera kaj iel fragila kiel porcelana ĉina vazo. Onklino Maria amis ŝin kiel sian filinon kaj ĉiam estis preta helpi ŝin. Kaŝe onklino Maria ege fieris, ke Irina estas pentristino kaj tial ŝi ne permesis al Irina fari la pli pezan hejman laboron.

"Lasu tion al mi, ofte diris onklino Maria, vi devas pentri, la hejma laboro disipos vian talenton."

Kiam unuan fojon, antaŭ dekkvin jaroj, Petro diris al onklino Maria, ke li amas junulinon, kiu

studas en la Pentroarta Akademio kaj ili deziras geedziĝi, onklino Maria ne tre ekĝojis. Ŝi ĉiam opiniis, ke la pentristoj estas iom strangaj homoj, kies arton ne ĉiuj komprenas kaj malfacile ili trovas taŭgan laboron. Tiam onklino Maria nenion diris al Petro. Ŝi ege amis sian solan filon kaj ne deziris eĉ per rigardo aŭ per gesto esprimi sian malfavoran opinion. Tiam silente ŝi konsentis kaj kiam Irina eniris ŝian domon, onklino Maria komprenis, ke Petro ne eraris.

Irina estis rava, kara kaj onklino Maria opiniis, ke ŝi ne povas deziri pli grandan donacon en sia vivo. Post jaro naskiĝis la unua nepo Anton, kiu ricevis la nomon de la

patro de Irina kaj post du jaroj naskiĝis Maria, kiu nature ricevis la nomon de onklino Maria. Tiel la eta domo de onklino Maria pleniĝis. La infanoj rapide kreskis kaj zorgante pri ili, onklino Maria pli facile povis travivi la doloron pri sia forpasinta edzo, kiu subite mortis, kiam Petro studis en la lasta jaro de la Maŝinteknika Universitato.

Iel nesentebles en zorgoj, ĝojoj kaj doloroj pasis la jaroj. Petro kaj Irina aĉetis novan, vastan loĝejon, Anton kaj Maria elkreskis kaj jam frekventis la bazan lernejon. Anton lernis en la oka klaso kaj Maria en la sesa. Petro estis inĝeniero en la televidfabriko, Irina instruis pentroarton en la Pedagogia Altlernejo. De tempo al tempo onklino Maria sentis, ke ili ambaŭ ne estas kontentaj pro siaj laborlokoj. Jam de jaroj oni malhelpis al Petro enkonduki en la televidaparatojn iun sian gravan inventon. La ĉefoj enviis liajn teknikajn kapablojn kaj timis, ke li, la juna inĝeniero rapide okupos iliajn postenojn.

Irina obstine laboris, pentris, sed ŝi ne havis protektantojn kaj tial tre malofte ŝiaj pentraĵoj estis akceptitaj por la jaraj naciaj ekspozicioj kaj pri memstara ekspozicio ŝi eĉ ne povis revii. Tiuj ĉi problemoj kompreneble ĉagrenigis ilian vivon, sed onklino Maria, kiel patrino, ĉiam trovis okazon trankviligi ilin.

"Vi ne pensu pri tio, karaj miaj, ofte diris ŝi, la vivo ĉiam malfacilis, vi ĝoju, ke vi sanas, ke vi havas du belajn infanojn, ke vi junas, laboras, havas oportunan domon kaj iom post iom venos ĉio alia."

Ŝi ne sciis, ĉu tiuj ĉi vortoj vere trankviligas ilin, sed ŝi feliĉis, ke en la familio de ŝia filo regas konkordo. Iel tamen ŝi deziris ĝojigi ilin kaj kiam ŝi eksciis pri la ekskurso al Kubo, ŝi tuj proponis al ili:

- Uzu la eblecon kaj vizitu tiun ĉi landon.
- Tio sonas fantazie - ekridetis Petro. - Kiu havas tiom da mono por simila ekskurso?
- Almenaŭ tiom da vi havas - replikis onklino Maria. - Kaj nun vi devas iri, ĉar verŝajne alifoje ne estos simila okazo.
- Ne. Mi ne povas lasi la infanojn ĉi tie solaj - diris Irina.



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

- Do, se vi deziras veturi kun ili, mi ankaŭ monhelpos vin iomete kaj vi vojaĝos kune. Anton kaj Maria nepre devas iri. Se mi ne havis eblecon veturi, vi kaj ili devas veturi. Ili nepre vidu aliajn landojn, aliajn homojn, aliajn kutimojn. Ili nun kreskas kaj ili bezonas tion.

Finfine Irina kaj Petro decidis, ke ne valoras ŝpari monon kaj pli utilas vidi Kubon. Febra estis la preparo; pasportoj, biletoj kaj jen - morgaŭ matene la aviadilo forportos ilin ege malproksimen, sed la plej ĝoja kaj la plej feliĉa estis onklino Maria.

- Kaj, Antonio, ne forgesu sendi al mi la plej belan bildkarton el Havano. Vi scias, ke mi kolektas bildkartojn de diversaj urboj, sed nur de Havano mi ne havas.

- Al vi, avinjo, speciale mi elektos la plej belan bildkarton - promesis ĝoje Anton.

- Kaj vi, Manjo, portu al mi etan koralon.

- Kompreneble, kara avinjo, vi ricevos belegan nigran koralon.

Ili forflugis kaj onklino Maria iom time rimarkis, ke ŝia eta loĝejo subite iĝis iel pli vasta kaj ege silenta. La tagoj pasis kaj ŝi konstante pensis pri siaj infanoj.

- Do, kion nun faras miaj "kubanoj"? - ofte demandis ŝi sin mem. - Ĉu nun ili promenadas en Havano aŭ eble nun ili dormas, ĉar ja, kiam ĉe ni tagas, tie noktas.

Preskaŭ ĉiutage onklino Maria iris en la loĝejon de Irina kaj Petro por akvumi la florojn kaj iom aerumi la ĉambrojn. Dek tagoj ne estas multa tempo, sed onklino Maria komencis sopiri pri la nepoj. Tiel longe ili neniam estis for de ŝi kaj onklino Maria jam ege deziris vidi ilin.

- Restas ankoraŭ tri tagoj - nombris la tagojn onklino Maria.

Tagon, antaŭ ilia alveno, ŝi decidis surprizi ilin. Ŝi iris en la loĝejon kaj bone ordigis ĝin, purigis la ĉambrojn, viŝis la polvon de la mebloj, vicigis la librojn en la libroŝranko de Anton kaj Maria, kiuj ankoraŭ ne havis kutimon remeti sur la bretojn la librojn, kiujn ili legas kaj tial ĉiam sur la tablo, sur la kanapo kaj sur la seĝoj en ilia ĉambro, kuŝis libroj.

- Mi devas helpi al Irina - pensis onklino Maria. - Ŝi revenos laca kaj ne povos tuj ordigi la loĝejon.

Finfine alvenis la tago de la reveno. Onklino Maria kuiris bongustan manĝaĵon kaj decidis kun solena tagmanĝo renkonti ilin. Ŝi ne sciis je kioma horo ĝuste ili revenos kaj trankvile ŝi atendis ĝis tagmezo. Tamen pasis dektria, dekkvara, dekkvina horo... Ekstere malheliĝis, komencis vesperiĝi, sed onklino Maria daŭre sidis sola ĉe la tablo, belege aranĝita por la solena tagmanĝo. Nek por la vespermanĝo, nek dum la nokto ili alvenis.

- Kio okazis? - febre flustris onklino Maria. - Ĉu la aviadilo falis...

Tuŝan nokton ŝi ne povis fermi okulojn kaj ne ekdormis. Frumatene ŝi iris al la loĝejo de Irina kaj Petro, pensante, ke eble tre malfrue nokte ili revenis kaj tial ne deziris ŝin ĝeni, sed vane - la loĝejo orfe silentis. Bonege ordigita ĝi atendis ilin same.

Reveninte onklino Maria sentis, ke forta tenajlo jam komencas senkompate premi ŝian koron. Ŝi ankoraŭ ne sciis kio ĝuste okazis kun ŝiaj infanoj, sed jam ŝi antaŭsentis, ke io ne estas en ordo.

Ege lante ŝi paŝis kaj ŝajne hodiaŭ unuan fojon ŝi rimarkis, ke ĉi-jare la aŭtuno iel pli rapide alvenis. La tilioj, sur la ĉefa strato, jam preskaŭ senfoliis kaj io prema kaj trista estis en iliaj nigraj, nudaj branĉoj, similaj al oldulaj sekaj brakoj, etenditaj peteme kaj senespere al la ĉielo.

Sufera estis ĉi somero. Du monatojn ne pluvis, la tero sekiĝis, fendiĝis kaj eksimilis al vunditaj sangaj lipoj, kiuj dum pluraj tagoj eĉ guton da akvo ne trinkis. Pro la sekeco ĉio velkis kaj la rikolto mizeris.

Onklino Maria lante, pezspirante iris kaj iel mire ŝi konstatis, ke la vivo ĉirkaŭ ŝi fluas monotone

kaj enue kiel ĉiam. Antaŭ la ĉefstrataj vendejoj hodiaŭ same videblis longaj kaj senfinaj vicoj. La homoj kutimis vicstari de mateno kaj trankvile atendi dum horoj, sed kion ili atendas, kiam jam delonge la vendejoj tute malplenis. Ekestis malfacilaj, ege malfacilaj tagoj, pensis onklino Maria. Kio do okazis? Jam de jaro malaperis la nutraĵoj, la vestaĵoj, la ceteraj varoj. La vendejoj tiel malpleniĝis, ke ili tute eksimilis al grandegaj haloj, en kiuj jam eblis vetkuradi kun ĉevaloj. Ĉu neniu plu laboras en ĉi tiu lando?

Reveninte hejmen onklino Maria decidis ankaŭ hodiaŭ atendi kaj morgaŭ matene nepre iri en la Vojaĝoficejon por demandi ĉu tamen la ekskursantoj el Kubo revenis. Eble ŝi ne bone komprenis kiun tagon ĝuste ili devis reveni.

La tago pasis ege malrapide kaj turmente. Onklino Maria deziris nek manĝi, nek eliri el la loĝejo. Nokte teruran sonĝon ŝi sonĝis. Grandega birdo, simila al aglo, flugis alte en la ĉielo kaj sur ĝiaj vastaj fortegaj flugiloj, onklino Maria vidis Irinan, Petron, Anton kaj Marian. La birdo flugis super la oceano, super altaj furiozaj ondoj kaj portis ien malproksimen, malproksimen la infanojn de onklino Maria. Onklino Maria provis ekkriegi:

- Haltu, haltu, kien vi portas miajn infanojn? - sed ne eblis ekkriegi.

Flue, malrapide la birdo movis siajn vastajn flugilojn kaj malaperis en plumbkolorajn forajn nubojn. Onklino Maria denove provis ekkrii, sed vane. Ŝia ploro vekis ŝin kaj ŝi eksentis, ke amaraj larmoj ruliĝas sur ŝiajn sulkajn vangojn.

- Ili malaperis, ili malaperis - nevole flustris ŝiaj lipoj kaj tute ŝi ne sciis kion pensi pri la terura kaj koŝmara sonĝo.

Matene apenaŭ ŝi atendis la aperon de la suno. Ŝi prenis iun pli novan robon, vestis sin kaj preparis sin ekiri al la Vojaĝoficejo. Ankoraŭ estis frue, sed ŝi sentis, ke jam tute ŝi ne havas fortojn kaj se ankoraŭ iomete ŝi restus en la malplena kaj silenta domo, ŝi tuj mortos.

Elirante, en la ŝtuparejo, ŝi rigardis al la poŝkesto kaj ŝi subite glaciigis, kvazaŭ serpenton ŝi vidus. En la poŝkesto estis koverto. Tremmane ŝi malŝlosis la pordeton kaj prenis la koverton. Ŝi ne memoris kiel ŝi malfermis ĝin kaj eklegis, sed antaŭ ŝiaj okuloj komencis aperi ruĝaj, verdaj, flavaj makuloj.

Kelkfoje onklino Maria tralegis la leteron kaj tamen ne povis ekkredi, ke bone ŝi komprenas ĝin. Petro kaj Irina petis pardonon, sed ili decidis ne reveni. Ili restis en Kanado kaj ili provis klarigi, ke nun, dum la krizo, pli bone estus, se kelkajn jarojn ili vivus kaj laborus en Kanado. Ŝi ne maltrankviliĝu, ĉar post unu jaro ili invitos ŝin en Kanado.

Onklino Maria sentis, ke ŝiaj piedoj tremas kaj ŝi apogis sin je la muro, por ke ŝi ne falu. En la koverto estis la aviadilbiletoj por la reveno, kiujn ili kvarope jam ne bezonis kaj ili skribis, ke onklino Maria redonu la biletojn en la Vojaĝoficejo kaj reprenu la monon. Do, tiel ili deziris certigi al ŝi iom da mono.

Onklino Maria malrapide revenis al la loĝejo. Ŝi elprenis la aviadilbiletojn el la koverto kaj tre atente metis ilin sur la libroŝrankon.

"Do, karaj miaj, - ekflustris ŝi mallaŭte, karesante la biletojn per sia seka kaj osteca mano - por ke ĉio estu certa vi forsendis ilin, kaj tiel la reajn pontojn vi bruligis... Ĉu bone vi pripensis tion..."

Longe ŝi senmove staris, pensante pri Petro, Irina, Anton kaj Maria. Eble tamen dum dekkvin jaroj ŝi ne bone ekkonis Irinan, ja Irina ĉiam lamentis, ke iliaj salajroj mizeras, ke ili ne povas vivi ĉi tie, ke neniam ŝi faros memstaran ekspozicion kaj neniam Petro realigos siajn inventojn en la fabriko...

"Ĉu bone vi pripensis tion..." - flustris onklino Maria, rigardante senmove al la strato, kie la homoj komencis denove vicstari antaŭ la vendejoj.

GUTO



La varma somera pluvo rapide ĉesis. La suno, kiel heliant-kapitulo denove ekbrilis en la ĉielo kaj forpelis la lastajn nubojn.

Ani petis permeson-de sia patrino iri eksteren ludi, tien, ĉe la blankaj lekantetoj, kun pezaj pro la pluvo kapoj. Ili kliniĝis al la tero kiel hontigitaj infanoj, kaj la verda herbo ĉirkaŭe estis aspergita kun sennombraj diafanaj akvogutoj.

Enrigardante en ilin Ani pensis, ke ili estas kiel vitroperloj, el kiuj ŝi povas enfadenigi la plej belan kolieron. Subite inter ili ŝi vidis buntan Kokcinelon, haltintan antaŭ iu akvoguteto.

Ĝi turniĝis gracie je unua flanko, poste al la alia. "La Kokcinelo sin ĉirkaŭrigardas! Tio estas ĝia speguleto" - al si diris Ani kaj plu observis ĝin.

Neatendite la Kokcinelo leviĝis tute delikate, tuŝetis la guton kaj ĝis la infano komprenis kio okazas, la akvospegulo malaperis! "Sed kiel tio eblas?" - miris Ani kaj hejmenkuris.

- Panjo - ekkriis ŝi ĉe la pordo.
- Kio okazis?
- Panjo, la Kokcinelo englutis sian speguleton!
- Kia speguleto? - alrigardis ŝin senkomprene la patrino.
- La guto, en kiu ĝi sin ĉirkaŭrigardis.
- Certe ĝi estis soifa. Ĝi trovos novan guton por la alia spegulo.
- Kaj mi pensis, ke ĝi volas eltrinki ĉiujn akvospeguletojn - diris Ani kaj jam trankviligita direktis sin al la pordo.

Eli TOMINSKA

El la bulgara tradukis:
Lilija KOLEVA

Esperanto eniras pli unu universitaton en Brazilo. Post prezento de projekto pri instruado de Esperanto far de Alagoana Asocio de Esperanto, la direktoro de Kultura Centro de UFAL (Universitato Federacia de ALagoas) permesas ĝian instruadon flanke de fremdaj lingvoj (angla, franca, hispana, germana kaj japana).

La kursoj estos nedevigaj kaj okazos en tri ŝtupoj: baza, daŭriga kaj supera. Oni planas duhorajn lecionojn dufoje semajne dum 4 monatoj por ĉiu ŝtupo. La unua kurso komenciĝos en aŭgusto ĉi-jare.

Intertempe estos diskonigo de la lingvo inter la universitatanoj per prelegoj kun prezento de lumbildoj "Internacia Ekspozicio de UEA" kaj ekspozicio.

La instruisto estos Aristophio Andrade Alves Filho, ĵus diplomita Cseh-instruisto, dum 24-a ILEI-konferenco en Hanabanilla/Kubo.

La uzota metodo estos la Cseh-metodo per la libroj "Baza Cseh-kurso" kaj "Kurso de Esperanto laŭ aŭdvida struktura metodo".

Salutkartoj estas bonvenaj je la adreso: **ESPACO CULTURAL DA UFAL, a/c ALMIR GUILHERMINE, Praca Sinimbu - Centro - BR-57000-Maceio/AL, Brazilo.**

SCIIGO

Pro kulpo de Presejo "Georgi Dimitrov" kaj Ŝtata Firmao "Razprostranenie na pečata" (Distribuado de la gazetaro) - Sofio, malfruiĝis la ekspedado de n-roj 1-4/1991 de "Bulgara Esperantisto".

La Redakcio

EN SINCERA ETOSO

La Estraro de BEA okazigis renkontiĝon kun honoraj membroj kaj veteranoj de la Asocio el la ĉefurbo. Ĝi okazis la 20-an de junio k.j., pasis en etoso de bonintenco, kompreniĝo kaj sincero. La renkontiĝo estis gvidata de Nikola Nikolov, estro de Sofia E-Kulturdomo.

Petar Todorov, prezidanto de BEA kaj vicdirektoro de mastruma firmao "Globus", faris detalan jarraporton pri la asocia agado. Menciante la pezan ekonomian krizon, en kiu troviĝas Bulgario, li emfazis, malgraŭ tio ne ŝanĝiĝis la flata opinio eksterlande pri forta bulgara E-movado. Malpliigi la gajnoj de firmao "Globus" - ĉefa rimedfonto de BEA, pro la malfavora ekonomia situacio en la lando. Tamen oni rilatas la ŝanĝiĝantajn ekonomiajn kondiĉojn kaj strebas preni konformajn decidojn rilate la vendadon de la produktaĵoj kaj ŝanĝon de la produktadspecoj. Pro la malaltiĝintaj enspezoj, por la buĝeto de BEA necesas redukti la nombron de ofistoj de la Asocio. Por havigi monrimedojn por la asocia agado oni klopodos lui la neuzatajn nemoveblajn proprietatojn de BEA en diversaj urboj kaj lokoj en la lando. La Estraro entreprenis koncernajn paŝojn por pli bona mastrumado de IEK - Pisanica. Ĉi-momente okazas likvidado de la ŝuldoj de la malfondita BEA-firmao "Esperanto-Turist".

Ĉi-jare estas observata certa malaktiviĝo de la lokaj E-societoj kaj kulturdomoj pro objektivaj ekonomiaj kaŭzoj kaj pro amaslernado de fremdaj naciaj lingvoj lige kun ŝanĝiĝintaj veturkondiĉoj eksterlandajn. Tial bulgara E-movado serĉas alternativajn formojn de E-aktivado. Plu evoluas la internaciaj kontaktoj de BEA kun landaj E-asocioj. Menciindas la starigitaj ligoj kun novefondita Albana E-Asocio (i.a. oni invitis du albanajn funkciulojn kiel gastojn de ĉi-somera ISEU en V. Tarnovo kaj en la E-kursoj en IEK-Pisanica).

Sekvis prezento de la eldonplano de BEA por kuranta jaro far Venelin Mitev, vicprezidanto de la Asocio kaj prezidanto de asocia firmao "Pres-Esperanto". Lastatempe aperis du volumoj de E-legolibro "Ek al leg!" de Kiril Velkov kaj Hektor Alos - tre interesa kaj bona helpilo por ĉiuj esperantistoj, kaj broŝuro "Veliko Tarnovo". En preparo estas jenaj eldonaĵoj: E-legolibro de Marin Bacev, "Konciza historio de la bulgara Esperanto-movado" de Nikola Aleksiev, "Humanismo" de Dimitar Simeonov kaj "Tradukarto" de Venelin Mitev. Oni intencas lanĉi E-broŝurserion "Survoje", konsistantan el originalaj verkoj de bulgaraj esperantistoj.

Post ambaŭ raportoj okazis vigla diskutado, en kiu partoprenis Iv. Peev, C. Murgin, N. Aleksiev, V. Oljanov, N. Nikolov, M. Zdravev kaj D. Mutuŝev. Ĉiu el ili esprimis siajn konsiderojn kaj rimarkigojn, faris proponojn pri plua evoluigo de bulgara E-movado kaj starigis demandojn al la prezidanto, kiu detale respondis. Fine okazis malgranda koktelo, dum kiu daŭris en grupoj interparoloj pri la tuŝitaj temoj.

Evgeni GEORGIEV

GRAVA RIMEDFONTO

La ekonomiaj malfacilaĵoj kaj la nekontentiga financa stato de BEA reflektas finance al ĉiuj societoj en nia lando, inkluzive de "Vekiĝo" - Ŝumen. Provizore estas ĉesigitaj ankaŭ la subvencioj de loka komunuma konsilantaro kaj kelkaj entreprenoj. Nun la lupagoj, la prezoj por elektro, hejtigado, telefono, kancelariaj varoj k.a. estas kelkoble pli altaj. Tio devigis la estraron serioze pripensi aliajn fontojn de monakiro.

Post kelkaj diskutoj kaj konsultiĝo kun specialistoj, oni decidis subskribi kontrakton por helpo kaj kunlaborado inter la societo kaj Akcia Firmao "Agrobiznes" - Ŝumen. La membroj unuanime aprobis la iniciaton. La kontrakto jam estas fakto kaj validos unu jaron. Ĝin subskribis la du prezidantoj - d-ro Ljudmil Conov kaj Ljudmil Blagoev. Oni diras, ke iliaj samaj propraj nomoj estas hazarda koincido. Laŭ la kontrakto la Firmao havas rajton uzadi la kancelarion-klubejon de la societo por iuj propraj bezonoj, kaj ĝiaj akcianoj membroj en la societo. "Agrobiznes" devigas sin transpreni la elspezojn por la ejo - lupagoj, hejto- kaj telefonkostoj k.a. La vekiganoj helpados por vendado de la firmaa produkto en- kaj eksterlande per Esperanto, por korespondado, reklamado, internaciaj rilatoj, adresoj ktp. Ili havas la rajton aliĝi per akcioj individue kaj kolektive al la Firmao.

La unuaj paŝoj estas kuraĝigaj, optimismaj. Oni esperu, ke la komuna afero prosperos.

Cvjatko STOJANOV

TURISTA RENKONTIĜO

La 11-an kaj 12-an de majo 1991 ĉe la montopinto "Koja Kus" proksime al Targoviŝte okazis la Kvina Turista E-renkontiĝo. Tiu renkontiĝo ĉiujare okazas tradicie ĉe la sama loko kaj dato, organizata de E-societo "Verda Eskadrono" - Targoviŝte.

La renkontiĝon partoprenis pli ol kvardek esperantistoj el Ŝumen, Kaspiĉan, Popovo, Slavjanovo kaj Targoviŝte. En amika rondo kaj etoso la partoprenantoj ĝuis la verdan kaj florantan naturon.

Esperantaj paroloj kaj kantoj sonis dum la tuta vespero ĝis noktomezo. Kromaj amuzaĵoj fare de la organizantoj estis konciza kvizo rilate la historion de Targoviŝte, kaj tombolo el kiu ĉiu akiris po iun esperantaĵon.

D. TODOROV

Pri la XII Ĝenerala Konferenco de MEM

En Bydgoszcz (Pollando) kunsidis komence de majo la XII plej alta forumo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

La tagordo havis kiel ĉefan punkton la temon pri reorganizo de la tuteca agado de MEM kaj ties prioritatojn konekse kun la aktuala internacia atmosfero.

Partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj el diversaj landoj. Pro konataj financaj malhelpaĵoj ne povis alveni la konferencon reprezentantoj de MEM-sekcioj el **Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio kaj Germanio (eksa GDR)**. **Nome pro tio la konferenco decidis ne organizi novan elekton de gvidorganoj. Do, MEM daŭre agados sub la direktado de la ĝisnuna Sekretariato.**

La kunsidoj pasis en bona amika atmosfero, la debatoj estis viglaj kun amasa partopreno de la partoprenintoj. Oni traktis la nunan staton de MEM, la fincan bazon, la perspektivon pri plua eldonado de "La Pacaktivulo" en Belgio kaj pri la estonta eldonado de revuo "Paco" ekster Bulgario. (Kiel konate, depost 1974 "Paco" aperadis en Bulgario subvenciata de Bulgara E-Asocio.) Okazis interŝanĝo de opinioj pri la abonprezo de "Paco" por landoj kun nekonvertebla valuto, pri la konsisto de nova redakcio de "Paco". Oni turnis specialan atenton al la estonta nomo kaj siglo de MEM kaj al la titolo de ties presorgano "Paco". Estis diversaj proponoj. Ekzemple: konservi la nunajn

inicialliterojn MEM, fari ŝanĝon en senco Mondpaca kaj Ekologia Movado (MEM), Movado por Pluvivi (MPV) k.a. Pri la titolo de "Paco" ankaŭ abundis proponoj: "Mondpaco kaj Ekologio", "Pluvivo", "Paco kaj Ekologio", "Paco" (kun subtitolo: Forumo de esperantistoj), "Paco" (Esperantista forumo pri justeco en la mondo), "Paco" (Esperantista forumo por monda protekto) k.a. Oni daŭrigos serĉi konvenajn ŝanĝojn. Tial la Sekretariato de MEM petas pri novaj proponoj. Poste oni decidis kiun proponon aprobi.

La konferenca rezolucio insistas pri kelkaj bazaj prioritatoj kaj ĉefaj gvidlinioj en la estonta agado de MEM: la pacemaj esperantistoj kontribuas al la klopodoj por vera mondopaco; mondopaco signifas ne nur mondon sen milito, sed ankaŭ mondon, en kiu la homoj vivas harmonie kun la natura kaj kultura medio; la vera paco ne povas realiĝi per minaco far la forto.

Laŭ propono de Hungario la estonta ĝenerala konferenco okazos en konvena tempo en Budapeŝto.

La bulgaraj MEM-anoj pridiskutos la konferencajn dokumentojn kaj klopodos reaktivigi sian agadon en la spirito de nova monda kaj interna situacio.

Nikola ALEKSIEV,
honora prezidanto de MEM

Kiel antaŭe multaj E-periodaĵoj plu atingas nian redakcion. Mankas nur la Esperantaj gazetoj kaj revuoj, aperintaj en la eksaj socialismaj landoj. Pro la komplika ekonomia situacio en tiuj "novaj demokratioj", direktigitaj kuraĝe al merkata ekonomio, la tiea E-movado provizore stagnas pro la radikale ŝanĝiĝantaj sociaj kondiĉoj. En la aliaj landoj la E-gazetaro ĝenerale konservas sian aperritmon.

En siaj lastaj **n-roj (4-6)** "**Heroldo de Esperanto**" aperigas kalendaron de E-kongresoj kaj internaciaj renkontiĝoj en 1991. Bedaŭrinde multaj el ili povos esti nur revo por la orienteŭropanoj. Estas tre aktuala kontribuado "La lingva situacio ĉe la Internaciaj Registraj Organizaĵoj (IRO) de Gian Carlo Fighiera (Italio). Per multaj faktoj estas prezentitaj tendencoj, kiuj montras malfortiĝon de la angla, de la franca kaj de la germana lingvoj. Tamen la parola kaj skriba uzo de la angla distanciĝas de tiu de la aliaj lingvoj. La aŭtoro konkludas, ke plej trafa solvo povus esti unulingvismo sendiskriminacia, bazita sur Esperanto. Por tio sufiĉus politika volo kaj relative malmultaj rimedoj. En la sama gazeto (**n-ro 6**) estas tre interesa artikolo "Zamenhof" kaj "Esperanto" en la kosmo" de Hugo Rollinger. Temas pri du asteroidoj malkovritaj en Finnlando en 1936 kaj 1938, kies dimensioj estas pli

grandaj ol satelitoj de Marso. La aŭtoro rakontas ankaŭ pri spacveturilo "Voyager 2", lanĉita en 1977. En ĝi troviĝas mesaĝo al eblaj eksterteraj inteligentaj estaĵoj. Unu el la lingvoj de tiu mesaĝo estas Esperanto. Sub titolo "Teatro "Fokuso" en **n-ro 7** de la sama periodaĵo aperas informo pri la novefondita arta E-trupo ĉe BEA kaj ĝiaj nunaj spektakloj.

En "**La Espero el Koreio**" (**n-ro 2/101**) Sergej Anikejev (Rusio) per sia artikolo "Ĉu ni venkos malfacilan Esperanton" daŭrigas la diskuton pri la fremdlingva instruado. Li kredas, ke la lingvoj estas esence samaj, la diferenco estas ĉu lingvoalproprigo estas denaska aŭ truda. Ĉiu fremdlingva lernado estas malfacila, peniga. Esperanto ne estas ankaŭ panaceo rilate bonan gramatikon, kiu forigus tiel ĝenajn lingvajn apartaĵojn. Ni devas lerni Esperanton, ŝvitpeni kaj atente sekvi ĝian evoluon, konkludas la aŭtoro. En la sama **n-ro** troviĝas rakonto "La sekreto de sinjorino Lunk" de nia samlandano Julian Modest. Jam tradicie preskaŭ en ĉiu kajero aperas koreaj popolfabeloj tradukitaj de Choe Tae-sok, ĉi-foje - "La tu filoj".

En "**El popola Ĉinio**"

(**n-ro 5**) sub rubriko "Homoj neforgeseblaj" Chen Juan rakontas pri sia kunlaboro en la 30-aj jaroj kun hungara esperantisto Braun. Ili renkontiĝis en Hongkong kaj estiĝis ne nur ordinara amikoj, sed ankaŭ kunlaborantoj kontraŭ japanaj agresantoj. En 1938 Braun komencis eldoni E-gazeton "Orienta Kuriero", por kiu Chen Juan kontribuis.

"**Sennaciulo**" (**n-ro 5**) publikigis la informon de Jves Peyrant pri la kongreso de SAT-Amikaro en Ambuazo, Francio. Ĝi havis riĉegan programon, i.a. priekologiaj prelegoj, koncerto, ekskursoj ... kaj laborkunsidoj.

La Redakcion atingis ankaŭ informilo "**Latvia Esperantisto**", en kies **n-ro 7 S.** Neilande skribis artikolon "Literatura fenomeno de Ludmila Jevsejeva", prezentanta la faman latvian E-poetinion, kiu estis elstara figuro de la E-movado kaj literaturo. En Sofio aperis libreto "Zooparko" (1966) enhavanta ŝiajn porinfanajn versaĵojn. L. Jevsejeva aktuale kunlaboris kun multaj konataj E-literaturistoj kiel K. Kalocsay, J. Baghy k.a., al kiuj ŝi dediĉis siajn poemojn.

R. GEORGIEVA



Deziras korespondi

BULGARIO

CVETELINA SPASOVA (19-jara studentino)
- Sofio, Ilinden, bl.132, vñ.E, ap.110 - kun
inteligentaj esperantistoj el ĉi.

RANGEL DIMČEV (33-jara) - 1220 Sofio,
kompl. Nadejda, bl.143, vñ.D, ap.114 - kun ĉi
pri ĉt.

IVAN ZAREV (36-jara, vegetarano) - 1618
Sofio, PK 132 - kun ĉi pri ŝako, muziko, joko.

NEPALO

s-ro MUKUNDA RAJ "PATHIK" - Quest
Language Institute, Kama Ipokhari Kathmandu -
kun ĉi pri ĉt.

s-ro RABINDRA ROY (18-jara) - kha-2, 783,
Om bahal tole, Kathmandu, kun ĉi pri ĉt.

POLLANDO

BEATA PRUS (30-jara) - PL-34-120
Andrychow, ul.Starowiejka 10/12 - interesiĝas
pri sporto, literaturo, Esperanto, turismo; kolektas
bk, pm.

BARBARA GLERUSZCZAK (27-jara fraŭlino)
- PL-34-120 Andrychow, ul.27 Stycznia 10/16
- interesiĝas pri turismo, problemoj de la homoj,
religioj, ekumenaj aferoj kaj Indio.

BARBARA BORGOSZ (20-jara fraŭlino) -

PL-34-120 Andrychow, Targanice 616 - kun ĉi
pri turismo, danco kaj kolektas bildkartojn.

GRAZINA ZAWADA (25-jara) - PL-97-400
Belchatow, os. Dolnostaskie, ul.R. Luxemburg
5/7 - kun samaĝaj esperantistoj pri poezio,
turismo, muziko.

RUMANIO

CRISTINA MARCU - Alea Cringului 5 BL
203 Sc B, et. IV, ap. 9, 2200 Brasov - kun ĉi pri
ĉt.

MARILENA NICA - Str. Codrul Cosminului
72, Bl 16, sc A, ap.3, 2200 Brasov - kun ĉi pri
ĉt.

SOVETUNIO

MARINA SAFRONOVA (flegistino) -
SU-614080 Perm, p.b.894 - kun ĉi pri vojaĝoj,
muziko, trikado, kolektas bk, pm, afiŝojn de
kantistoj.

RENATA BANEVIČIUTE - Str. Vairo 14-149,
SU-232044 Vilnius, Litovio - kun ĉi pri ĉt.

BORIS ĈIKIRJOV (31-jara kuracisto) -
SU-188950 Leningradskaja obl., Ojborgskij r-n,
Kamenogorsk, Bumajnikov 20-73 - kun
samprofesiaj, interesiĝas ankaŭ pri muziko,
ĥarkajgo kaj arto.

KIO-KIAM-KIE

RENKONTIĜO OMAĜE AL IVAN FLANJAK

La Esperanto-societo
"Liberiga Stelo" de Osijek
(Jugoslavio) organizas de la
1-a ĝis la 3-a de novembro la
VI-an Internacian
Renkontiĝon "Ivan Flanjak"
kun la labora temo
"Esperanto-informado en
Jugoslavio kaj Alp-Adrio".
Verkajn oni sendu ĝis la 1-a
de septembro al: **Liberiga
Stelo, Pk 27, JU-54001
Osijek.**


PROGRESIGA STAĜO

La Kultura Centro La
Kvinpetalo plue progresadas
kun daŭra celo: levi la
lingvonivelon. Ĉi-jare ĝi
sukcese organizis staĝon
dum la februara libertempo.
Ĉi-somere, de la 15-a ĝis la
20-a de aŭgusto, Ed
Borsboom (Nederlando)
gvidos staĝon laŭ la temo "La
literatura listo de William
Auld". W. Auld deziras, ke ĉiuj
esperantistoj konu almenaŭ la
plej bazajn romanojn kaj
poemarojn en Esperanto, kaj
tial li kompilis tiun liston. Inf.:
La Kvinpetalo, F-86 410

Bouresse, Francio.

PIEDMARŜO

Iniciata grupo de Movado
"Per amikeco al unueco"
planas organizi perpiedan
marŝon de Ural-montaro ĝis
Atlantika oceano (Ĉelabinsk,
USSR - Brest, Francio).
Interesiĝantoj kun proponoj
kaj demandoj bonvolu skribi
al: **Aleksandr Ŝatrov,
454116 USSR, Ĉelabinsk,
Komarova 110 "A" - 11.**



EN PISANICA


SOMERAJ INTERNACIAJ KURSOJ

Ĉi-jare Bulgara Esperanto-Asocio organizas por I-a, II-a, III-a gradoj kaj por Esperanto-instruontoj **12-tagajn kursojn**, kiuj okazos en Pisanica de la 1-a ĝis la 13-a kaj de la 14-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1991 kaj antaŭvidas po 70 studhorojn.

Unua servo - vespermanĝo, lasta servo - tagmanĝo en la menciitaj datoj.

Kotizo por la restado kaj instruado - 440 levoj.

La dezirantoj lerni Esperanton bonvolu sendi la kotizon al: **Cvetana Ivanova Angelova, Internacia Esperanto-Kursejo, vilaĝo Pisanica, distrikto de Plovdiv, kodo 4744.** En la poŝta dokumento nepre menciu kiun gradon vi volas studi. Por pliaj informoj : **tel. (0301) 2-27-12 (IEK - akceptejo) kaj (02) 32-40-68 (BEA).**



LABORA VIZITO

De la 17-a ĝis la 19-a de majo j.k. reprezentantoj de la sindikata organizo ĉe BEA vizitis Pisanica-n kaj havis du celojn: labori helpe al la laboristoj kaj la oficistoj en Internacia Esperanto-Kursejo kaj esplori la kondiĉojn por eventuala kontrakto pri utiligo de la restadejo far esperantistoj. Ĉeestis entute 15 personoj, inter kiuj ankaŭ la prezidanto de BEA Petar Todorov.

Nin renkontis la ĉiam belega naturo, aldone kun la bonega vetero. La kursejo estis renovigita kaj purigita de siaj dommastroj kaj pretas renkonti kaj gastigi novajn vizitantojn. Ĝi estas bone konata al la Esperanto-mondo ĉu per senperaj impresoj, ĉu per reklamaterialoj aŭ rakontoj de vizitintoj. Neesperantistoj povus ripozi kaj ĝui la ĉirkaŭaĵon ne nur dum la malvarmaj monatoj, sed ankaŭ dum la monatoj, kiam estas Esperanto-kursoj, nome julie kaj aŭguste. Tiam turistoj havus eblecon konigi al si la esperantismon.

La biblioteko de la kursejo estas en mizera stato, se temas pri la librostoko kaj la bibliografia ordigo. La dezirantoj labori okupiĝis pri la ordigo de la haveblaj libroj. Krome aperis ideo estonte disponigi al Pisanica po almenaŭ unu ekzempleron de ĉiuj liverataj de BEA libroj.


Dum la renkontiĝo estis pridiskutitaj la eblecoj pri ripozo kaj krea laboro de la membroj de ambaŭ sindikataj organizoj - tiu de BEA kaj tiu de IEK. Baldaŭ estos subskribita ankaŭ kontrakto inter la du organizoj.

Ĉar la membroj de BEA-sindikato loĝas ne nur en Sofio, sed ankoraŭ en kvin loĝlokoj, la renkontiĝo estis bona okazo por preparoli la kulturan Esperanto-agadon en la lando. La malfacila socia stato de la lando influis negative ankaŭ al la Esperanto-agado, se temas pri amplekseco de la organizataj aranĝoj. Guste pro tio ĉiuj konsentis, ke niaj streboj devas havi novan direkton - altiri atenton de neesperanta publiko per malmultaj kaj profesinivele altkvalitaj aranĝoj. La ĉeestantoj decidis okazigi seminarion pri Esperanto-kulturo la 15-an kaj la 16-an de junio j.k. en urbo Razgrad.

Nedka VALJAVIĈARSKA - prezidanto de sindikata organizo ĉe BEA



VORTENIGMOJ ĜEMELOJ



La vortoj komenciĝas de la kvadrateto kun la numero kaj iras laŭ la koridoroj konturitaj per pli dikaj strekoj. La literoj en la respektivaj kvadratetoj de ambaŭ vortenigmoj estas identaj.

Unus vortenigmo: 1. Novelaro de Julian Modest. 2. Baza koloro, sur kiu oni pentras. 3. Vojo inter konstruaĵoj en loĝloko. 4. Speco de nukso. 5. Trinkajo, preparita per infuzado de sekigitaj vegetaĵoj k.s. 6. Geometria figuro. 7. Superhoma estaĵo, kultata de homoj. 8. Elektitaro. 9. Nerva kuntiro de la muskoloj. 10. Antaŭe ordigita aranĝo de efektivigota entrepreno. 11. Pezo, unupeco maso de malmola materio. 12. Kongresurbo de la 26-a Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio. 13. Aro da personoj, grupigitaj ĉ. centro de intereso. 14.

Kongresurbo de la 61-a Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio.

Dua vortenigmo: 1. Granda, sonateca verko por orkestro. 2. Insekto, vivanta socie kiel la formikoj kaj konstruanta tre altajn fortikajn loĝejojn. 3. Flanko de geometria figuro. 4. Nokta rabobirdo. 5. Sufikso. 6. Maldika kaj mallarga peco de ligno. 7. Pli-malpli plena manko de lumo en loko, kiun maldiafana korpo apartigas de la lumfonto. 8. Scienco pri la moralo. 9. Aparta impresoj, kiun faras sur la okulo la diversaj elementoj de lumradio resenditaj de iu korpo. 10. Metala plato. 11. Valora metalo. 12. Prefikso. 13. Pozitiva elektrodo en pilo. 14. Universo.

Cvetan MANOJLOV

